

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

MAL- MUNTADO

(PAĜO 7)



Kotizoj de MONATO kaj LA JARO 1991

Kiom?

		MONATO		LA JARO
		surface	zero	
Aŭstralio	AUD	43	54	6
Aŭstrio	ATS	385	478	51
Belgio	BEF	1100	1375	150
Britio	GBP	18	22,3	2,5
Danio	DKK	214	265	28
Finnlando	FIM	130	160	1225
Francio	FRF	185	220	24,5
Germanio (okc.)	DEM	58	714	7
(or.)	DEM	40	53,4	5
Grekio	GRD	4300	5620	580
Hispanio	ESP	2950	3780	475
Hungario	HUF	800	800	70
Irlando	IEP	20	25	2,5
Islando	BEF	1000	1200	150
Israelo	NLG	55	66	8,2
Italio	ITL	40000	50000	5500
Japanio	JPY	5100	6180	775
Kanado	CAD	40	45,5	5,7
Korea Resp.	KRW	18700	23100	2750
Luksemburgo	LUF	1100	1375	150
Nederlando	NLG	62	77	8,2
Norvegio	NOK	199	247	31
Nov-Zelando	NZD	55	61,6	7,5
Portugalo	PTE	3900	5000	520
Sud-Afriko	ZAR	75	92	11
Svedio	SEK	198	243	27
Svislando	CHF	49	60	6
Tajvano	BEF	1100	1375	150
Usono	USD	31	35	4,5
Aliaj landoj	BEF	800	1000	125

Nota: Se vi pagas kotizon por persono en alia lando, validas la tarifo de via lando, ne tiu de la lando de la abonoto.

Al kiu?

Pagu al la landa kotizperanto...

Argentina: F-ino Marta Solis, Tucumán 50, RA-2600 Venado Tuerto (Santa Fé).

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Post Office Box 230, Matraville, N.S.W. 2036. Tel. (02) 661 2246.

Aŭstria: Aŭstria Esperanto-Movado, Postfach 156, 1014 Wien.

Belga: Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).

Brazila: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 11-1105, 70084 Brasilia.

Brita: Esperanto-Asocio de Britujo, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF (pĉk. 54 851 0008).

Ĉilia: Héctor Campos-Grez, poŝtkesto 231, Curicó.

Ĉina: Xi'an Esperanto-Asocio, Shishelian Xiyinglu 74 hao, Xi'an, Shaanxi.

Dana: Uwe Lohse, Donnerupvej 12, 2720 Vanlose (pĉk. 5144116).

Finnaj: Oy Mendoservo Ak, Kivistöntie, SF-05510 Hyvinkää, pĉk. 427 72-2.

S-ino Sirkka Mattlin, Hurtankatu 6, SF-05820 Hyvinkää, ĝirkonto: 829 49-8.

Francaj: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75000 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Esperanto-Klubo de Metz, 36 rue St. Marcel, 57000 Metz.

Cercle Culturel Esperanto, MJC de la

Croix des Oiseaux, Rue du Tambour d'Arcole, 84000 Avignon.

Germanaj: Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-W-8900 Augsburg (pĉk.: Nürnberg 650 92-858 (BLZ 760 100 85)).

Esperanto-Centro Paderborn, Postfach 1450, Paderborn (pĉk.: Hannover 259658-301).

Libera Esperanto-Asocio, Am Stadtpfad 11, D-W-6236 Eschborn (pĉk.: Karlsruhe 2125 01-759).

Literatura-Servo „Espero“, Rolf Beau, Jacobstr. 9, D-O-7010 Leipzig (Deutsche Bank Leipzig konton-ro: 1195106 (BLZ 86070000)).

Greka: Helena Esperanto-Asocio, Agiu Meletiu 54, 11252 Ateno.

Hispana: Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila, 127, portal 7, 2 izda., Santander (pĉk.: 03548531).

Hungara: Ernestina Lörincz, Harsfa u. 77, H-1162 Budapest.

Irlanda: Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12.

Islanda: Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.

Israela: Faklieru Aviv, David Elazar, 3 Holon IL-58410.

Itala: Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204).

Japanaj: KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561.

Nagoja Esperanto-Centro, Tōsin Biru 204, Higasisakura 2-13-23, Nagoja-si, Higasi-ku 461, Japanio.

Japania Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.

Kanada: Kanada Esperanto-Asocio, 6358 De Bordeaux, Montréal, Québec, H2G 2R8.

Korea: Korea Esperanto-Asocio, C.P.O. kesto 4258, Seoul-100.

Luksemburga: LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12).

Madagaskara: E. Raveloson, Boîte Postale 1663, 101 Antananarivo.

Nederlanda: Esperanto-Centrum Nederland, Riouwstraat 172, 2585 HW 's Gravenhage (pĉk.: 3583975).

Norvega: Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5.

Nov-Zelanda: Gwenda Sutton, 21 Rama Crescent, Khandallah, Wellington 4. Tel.: (4) 795 542; telekopii: (4) 795 571.

Portugala: Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. João Couto, 6, R/C.-A, P-1500 Lisboa.

Sud-Afrika: Colin Beckford, P.O. Box 1227, Cape Town-8000.

Svedaj: Esperanto-Skolan, Barnhusgatan 8, 11223 Stockholm.

Sveda Esperanto-Federacio, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby.

Svisa: Christoph Scheidegger, Im Baumarten 5, CH-4144 Arlesheim, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel.

Tajvana: Bradio V. Moro III, Gen. English Section, Hujin (Fu-jen) Universitato, Sin-chng, Tai-pak, Taiwan.

Usonaj: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530.

Bern Wheel Books, 834 Wenonah Ave., Oak Park, IL 60304.

Venezuela: J.E. Bachrich, Apartado 3833, 1010A Caracas.

aŭ pagu rekte al la eldonejo:
Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk-lei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

- Se en via lando ekzistas poŝtĉekonta sistemo, vi povas pagi al poŝtĉekonto n-ro 000-0265338-43 (poŝtĉekoficejo Bruselo, Belgio), de Flandra Esperanto-Ligo;

- Se en via lando ekzistas Eŭroĉekoj, vi povas sendi tian ĉekon. La valuto devas esti la **belga franko** (BEF) kaj dorse de la ĉeko devas troviĝi **via bankkartnumero**;

- Posedantoj de VISA, MASTERCARD, EUROCARD - aŭ ACCESS-kreditkarto simple sciigu per subskribita karto sian numeron kaj validodaton;



- Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon. La kontkodo de Flandra Esperanto-Ligo estas fela-x;

- Se vi havas konton en usona banko, sendu al ni ordinaran usonan bankĉekon. En tiu kazo la valuto devas esti la **usona dolaro** (USD).

Nur se vi ne povas pagi laŭ unu el la kvin supraj vojoj, uzu la jenajn, kiuj tamen kostos al vi multe pli:

- Sendu al ni ordinaran bankĉekon el via lando, prefere en belga valuto. Aldonu al la sumo 225 BEF aŭ ties egalvaloron plus la sumon kiun fakturos via banko. Bv. informiĝi tie. Sur la ĉeko vi skribu la nomon **Flandra Esperanto-Ligo**.

- Sendu al ni internaciajn respondkuponojn. Ili validas, se ili estas nur maldekstre stampitaj. Unu respondkupono egalas al 25 BEF.

Anonc-tarifo

	Grandeco mezuroj mm	prezo BEF
1/1	266 x 178	9900
3/4 trikolumna	198 x 178	7500
2/3	266 x 117	6700
1/2 dukolumna	198 x 117	5000
trikolumna	131 x 178	
1/3 unukolumna	266 x 56	3400
dukolumna	131 x 117	
1/4 unukolumna	198 x 56	2800
trikolumna	63 x 178	
1/6 unukolumna	131 x 56	1900
dukolumna	63 x 117	
1/12 unukolumna	63 x 56	1040

Aliaj formato: 40 BEF/cm²

Koloroj: Por aldono de koloro, pluspago de 3000 BEF.

Anoncetoj: 56 mm larĝa, 1 linio 40 BEF (minimume 5 linioj; ne eblas uzi fotojn, desegnaĵojn, emblemojn, kolorojn).

Suplementoj: Por aliaj paĝoj ol paĝo 2 10% pluspago (rabatebla). Pri apartaj reklamfolioj por kunsendado aŭ alvinkado kontaktu la eldonejon. Por loĝantoj el Belgio aldoniĝos la Aldonvalora Imposto de 19%.

Rabatoj: Ĉe ripeto de la sama anonco dum du sinsekvaj numeroj 5%, ĉe 3 ĝis 5foja aperado dum sama jaro 10%, ĉe pli ol 5foja aperado dum sama jaro 20%. 5foja ripeto de sama anonceto: - 40%.

Monato

internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo

monata revuo en la internacia lingvo Esperanto · legantoj en 80 landoj · 11a jarkolekto · aperas la 15an de ĉiu monato · abontarifo varias laŭlande; petu ĝin de la eldonejo · **eldonejo:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono 32-3-234 34 00, telekopiilo: 32-3-233 54 33; poŝtekkonto Bruselo n-ro 000-0265338-43 nome de Vlaamse Esperantobond, Antwerpen · valida anonctarifo: n-ro 5 · kompostita kaj presita en la eldonejo · por adresŝanĝoj nepre menciu la kodon kiu troviĝas dekstre sur la adreslipo · **redaktoro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-W-8900 Augsburg, FRGermanio · telefono kaj telekopiilo 49-821-520385 · 200 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 40 landoj · aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj) · represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto · kopi-rajto ĉe la eldonejo · bonvolu sendi registritajn leterojn nur se nepre necese · kun la redaktoro korespondu nur pri redakciaj aferoj, kun la eldonejo nur pri administraj aferoj (abonoj kaj anoncoj) · novelojn kaj poemojn sendu rekte al la prizorganto de tiu rubriko: S-ro W. Auld, 20 Harvies-toun Road, Dollar, Clackmannanshire, Scotland FK14 7HG · *verantwoordelijke uitgever:* Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen · la enhavo de signitaj artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' redakcio

enhavo 11a jarkolekto, n-ro 11, novembro 1990

leteroj	4-5
noticoj	6
raportoj	7-20
Krom la apude menciitaj i.a.: Kanado: La indiana somero (p. 1) – Feroio: Balen-kaptado ne senbrida (p. 8) – Virinoj kaj perestrojko (p.9) – Denove hejme – Rumanio naŭ monatojn post la revolucio (p. 10) – Kiu sovetiano volus labori eksterlande? (p. 11) – Obskuraj radikoj de la Luma Epoko (p. 13) – Telefonkarto limigas vandalismon (p. 15) – Francio: La Ciotat, ĉu morto aŭ turismo? (p. 16)	
eseo	21-23
Ĉu homa socio estas iluzio? de János Sárközi	
kuir-recepto	23
serio	24
Konsiloj pri edukado	
novelo	25
Blanka oro de V. Verda	
junularo	26
hobio	27
kurso	28
Ludi gitaron sen notoj	
satiro	29



Iam ĝi estis malsanulejo, nun en la korto kreskegas fiherboj – rezulte de civitana milito, en Surinamo ekzistas fantoma urbo. Legu pri ĝi sur p. 12.



Ĉi tiu nekutima veturilo vere estas aŭtomobilo: ĝi bezonas nur minimuman kvanton da benzino. Legu la raporton sur p. 17.

Nia frontpaĝa foto: Ĉiuj deziras pramane depreni literojn de Leninmonumento en ukraina urbo Ternopil. Kial ĉie en Sovetio oni nun mal-muntas tiajn monumentojn, vi povas legi sur p. 7.

Estimataj gelegantoj,

jen epizodo, kiu prilumas la malfacilan situacion de esperantistojen (iamaj) komunismaj landoj: Dum Esperanto-renkontiĝo mi gvidas buson por ekskurso kaj prezentas min kiel redaktoron de MONATO. Poste alparolas min sinjorino el eksa komunisma lando kaj rakontas, ke ŝi estis la sola esperantistino en la urbo, kiu dum pluraj jaroj ricevis nian revuon, kvankam la ŝtata cenzuro konfiskis ĉiujn aliajn. Amiko ŝia el neŭtrala lando regule sendis la magazinon, iom kaŝitan inter aliaj malpli „danĝeraj” revuoj. Ŝi supozas, ke presajtoj el neŭtralaj, do ne „fifamaj okcidentaj” landoj pli facile pasis la cenzuron. Pensiga detaleta, kiun oni konsi-

deru kiam nun oni riproĉas al gvidantoj de Esperanto-movadoj en tiuj landoj pasintajn kondutojn. Certe, inter ili estis konvinkitaj komunistoj, tamen eĉ ili ofte agis kontraŭ ordonoj kaj preskriboj de la reĝimo, kiam temis pri la internacia lingvo, kvankam oficiale ili defendis la reĝimon. (Se ili ne farus, ili ja perdus sian postenon kaj oni metus tien alian, pli ortodoksan komuniston!) Kun Esperanto-Centro en tia lando ni ekzemple havis interkonsenton: Ni sendis al la centro, tute oficiale, kelkajn ekzemplerojn de MONATO; la cenzuro toleris, ĉar ja temis pri komunisma organizaĵo. La centro plusendis la revuojn al individuoj. Kaj ankaŭ en tiu ĉi okazo neniu perfidis. Certe, kiam nun en la Esperanto-

movadoj de tiaj landoj oni demokrate elektos estrarojn, la malnovaj funkciuloj probable ne plu havas ŝancon je reelektiĝo; oni povas kompreni, ke la homoj ne plu volas esti gvidataj de kompromititaj „samideanoj”. Sed simple kondamni ilin estus tro simple. Eble ili foje skribos pri siaj spertoj novan ĉapitron de „La danĝera lingvo”.

Sincere via
Stefan Maul

Stefan
Maul



Internacia armeo

Mi tute apogas la opinion de Paolo Cerretini (MONATO 1990/9, p. 8) pri internacia armeo. Mi volas jene raporti kiel ŝajnas eble, al mi, atingi kreon de tia armeo. En la nuna momento de konkordo inter Usono kaj Sovetio, estus eble ke UN starigas tian internacian armeon, nepre nenuklean! Post tiu kreo, kaj laŭmezure kiel ĝi plifortigas, la du grandegaj potencoj kune kun la aliaj konstantaj konsilantarmembroj, devus antaŭenirigi internacian malarmigon, ambaŭ nuklean kaj nenuklean. Laŭ ĉia kred-ebleco, la nunaj nukleaj potencoj devus longe daŭre posedi minimumon da nukleaj armiloj, sed fine tute forigi ilin. Antaŭe, ĉiuj aliaj landoj devus forigi siajn armeojn. Restu nur policmilitistaro, kaj neniu grava armilo. En tia mondorganizaĵo ne estus eble ke iu diktatoro invadus alian landon, kiel ni vidis ĉisomere en la golfobordo.

Marty Raymond, Francio

Defend-armeo internacia?

Paolo Cerretini (MONATO 1990/9, p. 8) pledas por internacia militforto por kontraŭstari agresemajn ŝtatojn. Bonŝance la Ĉarto de UN jam antaŭvidas la aplikon de militaj rimedoj por respektigi la internacian juron, sed pro la „malvarma milito” la kvin konstantaj membroj el la 15-membra Sekureca Konsilio (SK) bedaŭrinde dum jardekoj ne sukcesis agi interkonsente tiucele. Tamen la okulfrapa agreso de Irako kontraŭ Kuvajto ebligis al la SK trovi sian povon por deviga interveno laŭ la intenco de la aŭtoroj de la Ĉarto. La reguloj pri devigaj rimedoj troviĝas en ĉapitro 7 (artikoloj 39-51). En kazo de minacoj kontraŭ la paco, rompoj de la paco kaj agoj de agreso, la SK povas aŭ rekomendi (kiel en 1950 kiam Nord-Koreio atakis Sud-Koreion) aŭ decidi (kiel nun okaze de la iraka atako) la rimedojn aplikendajn por restarigi la internaciajn pacon kaj sekurecon. Se la SK decidas pri tiaj rimedoj, ĉiuj ŝtatoj-membroj de UN senescepte estas jure devigataj observi la alvokon de la SK kaj disponigi al ĝi la necesan helpon, eventuale eĉ militforton. La rimedoj senmilitaj estas, ekzemple, la parta aŭ plena interrompo de ekonomiaj rilatoj kaj de fervojaj, permaraj, peraeraj, poŝtaj, telegrafaj, radiaj kaj aliaj komunikiloj kiel ankaŭ la rompo de diplomaciaj rilatoj. Se tiuj rimedoj montriĝas nesufiĉaj, la SK povas interveni per milita agado (demonstracioj, blokado, ktp.) En ĉiuj militaj aferoj la SK-on helpas

kaj konsilas la Komitato de la Milita Stabo kiu konsistas el stabestroj de la kvin konstantaj membroj de la SK aŭ de iliaj reprezentantoj. Tiu Komitato fakte ekzistas, sed ĝis nun restis senlabora. Por ebligi al UN apliki urĝajn militajn rimedojn, la ŝtatoj-membroj devas teni, laŭ interkonsento kun la Komitato de la Milita Stabo, naciajn aerarmeajn kontingentojn tuj disponeblajn por komuna agado. Ankaŭ tiu preskribo restis senefika kaŭze de la malvarma milito. Tamen laŭ la transiraj aranĝoj por sekureco en ĉapitro 17 de la Ĉarto, la kvin konstantaj membroj de la SK povas, ĝis la ekvalido de la ĵus menciitaj interkonsentoj, entrepreni kune aŭ kun aliaj ŝtatoj-membroj la agadon necesan por konservi la pacon. Fine, laŭ ĉapitro 8 la SK povas utiligi regionajn interkonsentojn aŭ organizaĵojn (kiel ekzemple NATO aŭ Pakto de Varsovio) por apliki la devigajn rimedojn deciditajn. Kiel oni vidas, UN disponas laŭstatute pri la necesaj povoj por konservi aŭ restarigi la pacon, sed ĝis nun „nur” mankis la praktiko. Eskil Svane, Francio

Mizeraĵ radioprogramoj

Tri radiostacioj komunikis al mi sian opinion post mia artikoleto en MONATO. Sed vidu kiel reagas homo kun konscienciproĉo! (MONATO, 1990/9, p. 5) Nur du frazoj en 64linia artikolo stimulus Svisan Radion Internacian al forta respondo, sennoma. Tiun stacion mi aŭskultis tre ofte, ne nur unu-du fojojn. Kial? Ĉar sekvas ĝin gaja kaj agrabla muziko. Mi nenion havas en la koro kontraŭ Svislando. Kontraŭe, ĝi tre interesas min. Kvankam ĝi estas eta, ĝi havas gravan influon. La svisoj estas afablaj. Mi iufoje vizitis la landon kaj bone memoras la montojn, la purecon, la bernan kazernon, la tintilojn de bovoj en la krepusko. Mi lernis plurajn svisajn dancojn, ĉar inter miaj miloj da danĉmelodioj sur kasedoj troviĝas multaj svisaj. Oni admiras la neŭtralecon, la demokratian konduton, la popolajn kostumojn, la financan scion. Sed sentoj de ĉio tia ne venis al mi el SRI-radiostacio. Ankaŭ ni havas iajn funikularojn, muzeojn, aŭtorojn, lagojn, riverojn - eĉ montetojn. Se oni deziras paroli pri siaj, oni faru tion elstare interese, des pli kiam oni devos lukti kontraŭ malamika atmosfero. Aĝo ne estas honto, sed certe aĝo malhelpas plej bonan prezenton. Pro tio, kiam dum la pasintaj monatoj BBC kaj aliaj radiostacioj petis intervuoton, mi mem ne faris, sed trovis

pli viglajn voĉojn. Ni pliaĝuloj faru la organizadon: junuloj faru la farendaĵojn. Evidente mia artikolo ne celis nur al SRI. Mankas multloke sinkritiko dum tro-indulgema aŭskultantoj, avidaj al ĉio kun Esperanto-vortoj, kontentaj pro la fakto de Esperanto-elsendaĵo, emas laŭdi senmeritaĵojn. „Libel”. Ho ve, mi tamen rigardu tiun minacon same kiel mi rigardas la libelon de la kampara flako, kiel delikatan kaj flagretan flirtaĵon en la sunbrilo de la svisa bonhumoro.

Will Green, Britio

Ankaŭ Newsweek eraras

István Ertl (MONATO, 1990/7, p. 9) plendas pri la uzo de malĝusta foto. Tiaspecaj eraroj foje ĝenas, precipe se temas pri homaj vizaĝoj, sed foje ili estas ridindaj. La junifina Newsweek publikigis ampleksan raporton pri reformo de ekonomio en eksocialismaj landoj. Ilustras ĝin inter aliaj foto subskribite: „Liberaj prezoj estas senchavaj nur se vi havas liberajn entreprenojn - vendado de ovoj en Varsovio”. Efektive, du viroj ofertas ovojn rekte el ŝarĝaŭtomobilo. La tiklaĵo estas pollingva prezanonco sur la foto. Ĝi tekstas: „Freŝaj ovoj 22 zlotojn - W.U.” Samtempe kun la apero de ĉi tiu numero ovo en varsovia bazaro kostis ĉ. 500 zlotojn. La foto certe ridetigis ĉiun rigardintan polon. Ĉu la libermerkato kaŭzas dudekoblan malkreskon de la prezoj? - oni volus demandi. Ja la vivo diktas alie. Versajne do la freŝaj ovoj ne tre freŝis. Ili tutcerte vendiĝis ankoraŭ en Pola Popola Respubliko, antaŭ pli ol unu jaro.

Wojciech Usakiewicz, Pollando

Unu Eŭropo - du kalendaroj

Via reĝustigo (MONATO 1990/10, p. 4) unue mirigis min, sed post ioma pripenso mi komprenis, ke mi erare kredis, ke temas pri gregoria dato. La de Carl von Linné menciita 12a de majo 1732 baziĝis ne sur la de papo Gregorio la 13a en la jaro 1582 reformita kalendaro, sed sur la nereformita t.n. julia kalendaro. Inter ambaŭ datsistemoj estis tiam 11taga diferenco! Multaj nord- kaj orienteŭropaj regnoj nur tre malfrue submetiĝis al la papa kalendarreformo, pri kiu la plej granda parto de la mondo fine konsentis. Tial ekzemple la rusan Oktobran Revolucion de la jaro 1917 Sovetio en la postaj jaroj festis - en novembro, ĉar intertempe ĝi same ankaŭ fine reformis sian kalendaron.

André Gilles, Francio

Amika lingvo

Kiam mi legis pri la 75a UK en Kubo (MONATO, 1990/8, p. 20) mi tre indigniĝis. Josef Kondor priskribis inter alie la ĉeeston de Fidel Castro. Ĉu estas ĝojige, ke la Esperanta lingvo estas disigota pere de granda diktatoro?

Lars R. Knudsen, Danio

Castro kaj ni

Kiel partopreninto en la 75a UK, mi ne povas kompreni la raportojn en la Esperanta gazetararo pri la akcepto fare de Fidel Castro. Unue mi pensis, ke la esperantistoj iras al tiu festeto nur pro la bona manĝo. Sed legante la Esperantajn gazetojn mi perdis mian iluzion. Mi estas feliĉa kaj fiera, ke mi *ne* partoprenis tion, kaj ke mi ne agis kiel ŝafo en granda amaso blinde sekvanta iun. Ĉu oni forgesis la historion de Esperanto? (Legu *La danĝera lingvo*-n: konataj diktatoroj masakris esperantistojn.) Ŝajnas al mi, ke la esperantistoj ne plu scias, kion signifas „diktatoro”. Ne gravas la mantelo, ne gravas la simpatiaj frazoj kaj ridetoj, diktatoro restas diktatoro. Ankaŭ Castro subpremas sian popolon kaj ne respektas la homajn rajtojn. Kaj, por mi, i.a. lia fama frazo „Mi konsideras min soldato de Esperanto”, signifas simplan eluzon de nia movado kaj perforto de la ideo de Esperanto. Sed la plej ŝoka afero en la tuto ne estas la mempropaganda apogo de Fidel Castro, kiun ni ja ne povus eviti. La plej ŝoka afero estas la histerie ĝojaj reagoj, kiujn la esperantistoj, „defendantoj de homaj rajtoj”, kapablas esprimi, simple ĉar diktatoro vizitis unu nian kongreson. Ĉu la tempo estas nun matura por kredi novan diktatoron? Kaj ĉu la esperantistoj avangardos en tio?

Bianka Jacobsen, Germanio

Pekino kaj ni

Antaŭ kelkaj tagoj, mi legis leteron de EPĈ-peranto en eŭropa lando. La skribintoj plendis, ke pro la afero okazinta en Pekino en julio pasintjare, la abonantoj de EPĈ en sia lando malkreskis de 80 al 50. Abonintoj bojkotas EPĈ-on kiel protesto al la pekina registaro. Tamen, tio estas malprudenta ago. En la nuna momento la lingva signifo de iu ajn periodaĵo en Esperanto, estas pli valora ol ĝia politika signifo. Kiel propagandilo EPĈ staras en malgrava loko en Ĉinio, kiu havas gazetojn en multaj lingvoj, kiuj ĉefe celas alilandajn legantojn. Kompare kun iliaj abonantoj, tiuj de EPĈ estas malmultaj. En Ĉinio, ekster Es-

peranta grupo, preskaŭ neniu aŭdis pri EPĈ. Sed en tuta Esperantujo, kiu ne konas ĝin? EPĈ ne malaperos. Se tamen ĝi malaperas el Esperantujo, estos perdo por ni, sed neniom tiu perdo influos la ĉinan registaron.

Liu Xiaozhe, Ĉinio

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn. Skribu al:
Redakcio de MONATO
Stefan Maul, Pferseer Str. 15
D-W-8900 Augsburg
FR, Germanio

Pri nomoj kaj regionoj

Legante la artikolon de K. Domoslawski kaj N.Z. Maimon „Por pli bone kompreni la formiĝon de Zamenhof” (La nica literaturo revuo, n-ro 41), en mian memoron venis nomoj koraj kaj bildoj de lokoj foraj. Sudokcidente de mia naskiĝloko Calatele [Kalacele], distrikto Cluj [Kluj] en Transilvanio (okcidenta Rumanio), troviĝas regiono, kiun la lokanoj nomas *Liteuaia* [Liteuaja]. Laŭ la tieaj vilaĝanoj, la nomo de tiu apudbarbara paŝtejo ekzistas jam de „longega tempo”. Min ĉiam interesis tiu nomo, precipe post la ekscio, ke sur la valo de *Jiu* [Ĵiu], en Valenio (suda Rumanio), vivis vojvodo, kies nomo estis *Litovoi* [Litovoj]. Ankaŭ tiu vojvodo, laŭ la popolo, vivis antaŭ „longega tempo” (fakte, en la 13a jarcento). Lia vojvodio nomiĝis *Litua*, kaj havis la centron ie en la ĉirkaŭejo de la nuna *Tigru Jiu* [Targu Ĵiu]. Enkalkulante la grandecon de la iama litva ŝtato, kaj ties sekvajn influojn en la tuta orienta Eŭropo, ne mirus min ekscii, ke *Lietuva*, *Litua*, *Litovoj* kaj *Lieuaia* havas komunan etimologion, komunajn radikojn, eble ie ĉirkaŭ *Vilna*. Esper-eble, la fakuloj donos, en la proksima estonteco, la respondon.

lonel Onet, Usono

Nomoj de malnovaj stratoj

En Utrecht kaj aliaj nederlandaj urboj kelkaj stratoj estas nomitaj laŭ la metioj; ekzemple la strato de la forĝistoj, de la tanistoj ktp. Strato de la forĝistoj kaj strato de la tanistoj estas plejofte ĉe la fino de la malnova urbo. En la malnovaj urboj estis multaj lignaj domoj. La forĝejoj, kie estis multe da fajro, povis facile kaŭzi grandan incendion. Tia incendio en la mezo de la urbo povis esti tre danĝera por

la tuta urbo. La tanistoj purigis la haŭtojn de la bestoj en la fosajoj; tio kaŭzis grandan malbonodoron. Tiel oni ankaŭ ne deziris la tanistojn en la mezo de la urbo. Ankaŭ muelilostrato ofte estas ĉe la fino de malnova urbo; la mueliloj ofte estis super la remparoj ĉirkaŭ la urbo, kie ili ricevis multe da vento. Ĉu estas tiaj ekzemploj ankaŭ en urboj de aliaj landoj? Volonte mi ricevus reagon je tiu ĉi demando.

Dr. A. van Hulzen,

H.F. van Riellaan 3,

3571 W.B. Utrecht, Nederlando

Abortigo, ĉu jes, ĉu ne?

Tiu diskuttemo nuntempe furoras en Pollando. Dum la tempo de t.n. socialisma sistemo, la abortigo estis laŭleĝa kaj la virino rajtis decidi mem. Nun sub influo de katolika religio, kiu pli kaj pli intervenas la vivon de civitanoj, oni provas reveni al iama leĝo de malpermeso kaj puno. Kuracisto, kiu faros abortigon estos punita per dujara malliberejo. Estas interese kiel aspektas tiu afero en aliaj landoj de la mondo. Se en MONATO lanĉiĝus diskuto je tiu temo, la legantoj povus ne nur informi pri la situacio en siaj landoj, sed aldoni ankaŭ propran opinion. Mi opinias ke virino rajtas mem decidi ĉu ŝi deziras infanon jes aŭ ne. Neniu puno haltigu ŝin se ŝi ne deziras ĝin.

M. v.d. Horst-Kolinska, Nederlando

Nur makuletoj

Vera lingvemulo povas nur ĝoji, ke MONATO spegulas la uzon de Esperanto pli-malpli tia, kia ĝi reale estas. Malaŭtoritatemo (aŭ tempomanko?) de la redaktoro igas lin respekti eĉ troe la stilon de liaj kunlaborantoj. La meritata (ata? ita? nu, daŭre kaj rezulte) populareco de MONATO tamen postulus la forigon de kelkaj, obstine agacaj malgramatikajoj, kiel ekzemple en la aŭgusta numero: „La gigantaj ekonomiaj problemoj necesigas, ke Sovetio ricevas subtenon ĉiuspecan el eksterlando (p. 8)” (kun tekste klare temas pri tio, ke ĝi ricevu subtenon); „... la Ruĝa Armeo rajtis *ofici* tiom da soldatoj...” (p. 11) (damna transitivo!); „Nun bildo jam estas demonstrita en galerio...” (p. 20) („Nun *la* bildo jam estas elmontrita/ata en galerio...”). Tiaj eraretoj ja nek tro gravas nek tro multas. Sed ĉu vi povas imagi, ke *Der Spiegel* aŭ *Time* enhavus tiajn malgermanajojn kaj malanglaĵojn?

István Ertl, Hungario

Piedo por la germana

La registaro de unuigita Germanio intencas postuli de Eŭropa Komunumo (EK), precipe de ties komisiono (la kvazaŭa registaro) en Bruselo, pli vaste kaj pli egalrajte uzi la germanan lingvon, ne nur la anglan kaj francan, kiel ofte okazas nun spite al tio, ke en EK ĉiuj lingvoj de la membroj-ŝtatoj estas samrangaj. La germana registaro ne plu volas akcepti la argumenton, ke pli vasta uzado de l' germana ne eblas pro la alta kosto kaj plendas, ke per la uzado de nur du oficaj lingvoj estiĝas malavantaĝoj por germanaj oficistoj, sed precipe ankaŭ por germanaj komercistoj kaj industrio. sm

Elektioj en Aŭstrio

La 7an de oktobro 1990 la aŭstroj balotis por nova parlamento. La socialistoj denove akiris la relativan plimulton, nome (el 183) 81 mandatojn (tio estas +1 kompare al 1986). La Popola Partio havas nun 60 mandatojn (-17), la Liberala Partio 33 (+15!) kaj la Verduloj 9 (+1). La sukceso de la socialistoj certe estas merito de la iama kaj estonta ĉefministro Franz Vranitzky [Franc Franicki], kies populara moknomo estas Vranz [Franc]. Verŝajne daŭros la koalicio inter la du plej grandaj partioj, do socialista kaj popola.

KLAG Walter

Koncerta malakordo

Vibris misharmonio tra muzikaj kaj aliaj rondoj en Britio, kiam orkestestro Mark Elder [Mak Elde] proponis, ke tradiciaj, patriotaj eroj estu elstrekitaj el de li direktota, fina t.n. *Proms*-koncerto - serio de londonaj somerkoncertoj ekzistanta dum jardekoj kaj ĉiam finiĝanta per programo kun almenaŭ unu himno spegulanta britan imperiisman pasintecon. La fina koncerto estas emocia sed, por multaj, senofende ĝuinda vespero en brita kultura vivo. Ĉi-jaron, tamen, rezonis, Elder, kiam prepariĝas milito en la Golfo (tie troviĝas ankaŭ britaj trupoj), patriotismo tro ekscitos militofajron, dum bezonata estas estingilo. Do, for ĉia koncerta sovinismo! Sed ne akordiĝis la argumentoj de Elder kun la tradiciemo de koncert-organizantoj, kiuj ordonis, ke restu la himnoj, malrestu Elder: tiu, elpostenigita, almenaŭ povos sin konsoleti per tio, ke li nun multe pli (fi)famiĝas en Britio pro sia „skandala” propono ol antaŭe. GUBBINS Paŭlo



Klara venko en parlamentaj elektoj por nova ĉefministro de Nov-Zelando, Jim Bolger (kun edzino Joan), de la Nacia Partio; la Labor-Partio reginta, post pluraj kvereloj, nun estas en opozicio.

Novaj germanaj landoj

Post la unuigo de okcidenta kaj orienta Germanioj (3a de oktobro) en eksa GDR meze de oktobro okazis elektoj al la parlamentoj de la kvin novaj landoj (tiel estas nomataj en Germanio la unuopaj ŝtatoj en la federacio). La rezultoj ne estis surprizaj: en ĉiuj landoj escepte de Brandeburgo venkis kristandemokratoj kaj povas koalicii kun liberal-demokratoj (kiel en Bonno). En Saksio kristandemokratoj eĉ akiris la absolutan plimulton en la parlamento kaj povas regi sola. En Brandeburgo (ĉefurbo Potsdam [Pocdam] apud Berlino) plimulton de voĉdonoj akiris socialdemokratoj. Por la unuaj tutgermanaj elektoj al la federacia parlamento la 2an de decembro oni prognozadas klaran venkon de kristandemokratoj sub gvido de kanceliero Helmut Kohl [Ko!]. sm

Partio de subvendistoj

La eksa komunisma partio en iama Germana Demokratia Respubliko nun nomiĝas Partio de Demokrata Socialismo (PDS). Kiam nun oni malkovris, ke la partio provis savi sian enorman monposedaĵon (laŭ lastaj taksoj 4 miliardoj da markoj), manipulante kontojn kaj subvendante en eksterlando, ĝi ricevis novan moknomon: PDS laŭ tio nun estas *Partei der Schieber*, t. e. partio de subvendistoj. Jam antaŭe, tuj post la nomŝanĝo, oni trovis moknomon por PDS: *Praktisch det selbe*, t. e.

en dialekto *praktike la sama*; per tio oni aludis, ke ja spite al la nova nomo la partio restis komunisma. sm

LINGVO-FESTIVALO

En aprilo 1991, jaro en kiu Dublino estos kultura ĉefurbo de la Eŭropa Komunumo, okazos en tiu urbo la unua *Festivalo de Lingvoj*, kiu poste iĝos okazaĵo de la irlanda kultura kalendaro. La festivalo efektiviĝos sub egido de la Banko de Irlando kaj *Institiúid Teangeolaíochta Éireann* (Lingvistika Instituto de Irlando), kaj nuntempe konsistas el 40 eventoj, kiuj inkludas skeĉojn, pup-teatraĵojn, ekspoziciojn kaj konkursojn (parolajn, kantajn, verkistajn, grafikajn, radiajn kaj amas-komunikilajn). La koncerna lingvoj estos precipe tiuj instruataj en irlandaj lernejoj (kun escepto de la angla), nome franca, germana, irlanda (gaela), itala kaj hispana, sed neniu lingvo estos elbarita, kondiĉe ke ĝi ne estu unua lingvo de la konkursanto. Esperantistoj en Irlando intencas enskribi sin.

Por pliaj informoj oni skribu aŭ telefonu al: Féile na dTeangacha, ITÉ, 31 Plás Mhic Liam, Baile Átha Cliath 2 (Dublino), Irlanda Respubliko. Tel. 01-765489, telekopiiilo: 610004. GCM

UKRAINIO

Malmuntado

Perestrojko, lanĉita de M. Gorbaĉov, permesis al homoj malkaŝe esprimi sian opinion. Perestrojko ne ŝanĝis pensmanieron, sed nur ebligis libere, ne timante pri sekva puno, eldiri tion, kio delonge kuŝis sur la fundo de homa cerbo kaj animo. Kaj tiu forte batis kontraŭ la komunisma ideologio kaj eĉ kontraŭ verkaro kaj persono de V. Lenin, kiu dum la longaj sepdekaj jaroj restis kiel sanktulo por multaj sovetianoj.

Tra multaj landoj de orienta Eŭropo nun kuris ondo de monument-malmuntado, kaj preskaŭ ĉiuj forprenitaj statuoj estis dediĉitaj al unu homo – al gvidanto de la monda proletaro, al ĉefo de ĉiuj mizeruloj. Kaj „hazarde” tiu ondo atingis Sovetion; estis preskaŭ samtempe (kun kelktaga diferenco) malmuntitaj monumentoj al V. Lenin en Litovio (Kaunas), Latvio, Ukrainio (Ĉervonohrad, Ternopil, Kolomeo), poste en ĉefurbo de Kartvelio, Tiblisi, kaj la saman decidon akceptis la urbokonsilio de armenia ĉefurbo Erevan.

En Ukrainio tiu fakto havis sian antaŭhistorion. La 26an de aprilo en ukraina ĉefurbo Kievo okazis granda manifestacio okaze de la 4a jariĝo de katastrofo en Ĉernobil. Partoprenintoj de tiu marŝo metis

dornan kronon al monumento kaj la kronon ĉirkaŭis bendo kun surskribo „Al V. Lenin – mortiginto de Ukrainio”. Sekve du junuloj estis arestitaj, kaj oni liberigis ilin nur post decido de supera konsilio de Ukrainio.

Ternopil estas la unua provinca centro de Ukrainio, kiu diris „adiaŭ” al fondinto de la unua socialisma ŝtato en la mondo. Ĉu ĝi estas bona ekzemplo, ĉu ĝin sekvas aliaj provincaj centroj (ankoraŭ 24)? Ni vidu.

Farita el hebrea kaj katolikaj tombŝtonoj

Vizitante Brition la aŭtoro aŭdis de sia angla samideano: „Vi ne miru pri la multeco de la nomo de Reĝino Victoria, ĉe ni ĝi abundas same kiel en Sovetio nomo de Lenin”. Kaj li pravis, ĉar nur en Ukrainio estis 5 015 monumentoj al V. Lenin kaj en provinco de Ternopil, kie loĝas 1,3 milionoj da loĝantoj, oni starigis 126 bronzajn kaj ŝtonajn statuojn – po unu monumenton por 10 000 homoj.

Post malmunto de monumento en Kolomeo (provinco de Ivano-Frankivsk) evidentiĝis, ke ĝia postamento estis farita el ruĝa marmoro kun surskriboj polaj kaj hebreaj – fervoraj plenumintoj de la moskva volo prenis tombŝtonojn de katolika kaj juda tombejoj, Lenin staris super la memoro pri famaj kaj simplaj urbanoj en Kolomeo.

Araneo

KANADO

La indiana somero

En Kebekio nomas *indiana somero* parton de aŭtuno, kiam provizore kaj bonvene revenas varma vetero. Ĉijare, ĝi estis pli frua, pli longa kaj pli politika.

Ĉio komenciĝis en marto, kiam mohaŭkaj indianoj blokis ŝoseon apud Montrealo, por protesti kontraŭ stulta decido fare de stulta urbestro, permesi pligrandigon de golfludejo, sur tereno, kiun la indianoj postulas sia. Dek-unuan de julio, la tiea urbestro vokis policon por ĉesigi la blokadon. Polico agis iom stulte, kaj mortis unu policano. Blokantaj indianoj ĝojegis *ni trafis unu*, ili kriis... Unua tago.

Tute ne temis pri paca manifestacio: tiuj *militistoj*, kiel ili nomas sin, kontraŭleĝe akiris potencan armilaron, kaj deklaris sin pretaj defendi sin, kaj sian *suverenan teritorion* de 36 mil km² (iom pli ol Nederlando, ekzemple), kiu inkluzivas Kebekion, Montrealon, Otavon, Toronton, Niagaron kaj Albany (Novjorko)... Mohaŭkoj estas kelkmil.

Kvankam la registaroj opiniis ilin krimuloj, komenciĝis negocado. Des pli urĝis, ke ankaŭ ponto al Montrealo estis same blokita. Grumblis la tieaj ĉirkaŭ-urbanoj.

Rapide oni decidis ĉesigi la sultan golfoprojekton, aĉeti la teron kaj donaci ĝin al la indianoj. Sed tiuj ĉi ankaŭ volis amnestion, la permeson konservi sian armilaron kaj la foreston de la „blankulaj” policanoj el la indianaj vilaĝoj kiujn ili volas regi.

Necesas aldoni, ke tiuj militistoj mem decidis defendi la *nacion*. Ankaŭ pluraj indianestroj opinias ilin perfortema krimularo. Sed ĉi tiu naciisma agado pravigis ilin ĉe multaj.

Armeo

Laciĝis la polico, kiu gardis la blokiĝojn (parto de ili estis detruitaj policaŭtoj). Neniame estis vera sieĝo fare de la polico, homoj kaj nutraĵoj trapasadis, post kontrolo. La 20an de aŭgusto (41a tago), la policon anstataŭis armeo, kiu tre bone kondukis, tiel mirigante ĉiujn... Ĝi ĉefe malebligis fuĝon de la militistoj, sed ankaŭ pretigis sin, okaze...

Pluis ĥaosaj negocadoj, ofte disigitaj de la indianoj aŭ de la registaro. Ĉiuj akuzis la aliajn je trompo. Fine, alia miriga ago: post ultimato de la ar-



Ŝajnas, ke Lenin adiaŭas – sed estas inverse: la loĝantoj de Ternopilo adiaŭas la prakomuniston.

meo, ĝi kaj kelkaj militistoj kune kaj pace demetis la barilojn (29an de aŭgusto), iom post iom revenis la veturebleco.

Nur poste iom aĉiĝis. Polico, kun arma helpo, vizitis kelkajn lokojn kaj tie trovis kontraŭlegajn armilojn, kaj arestis kelkajn. En unu kazo, la tieaj mohaŭkoj atakis la armeanojn: vundiĝis 75 indianoj kaj 10 soldatoj. En alia fojo, antaŭ la malfermo de la ponto, trairis ĝin kelkaj aŭtoj kun indianoj, luj montrealanoj, teditaj pro sia nerajto pasi, atendis ilin kaj ŝtonumis la preterpasantajn aŭtojn. Finfine, post tri-semajna sieĝo (tamen pasis nutraĵo) kaj post fuĝoprovo, rezignaciis la lastaj militistoj. Luj havis antaŭe la eblecon fuĝi aviadile. La tuto daŭris 78 tagojn.

Sekvoj

Nun la militistoj estas arestitaj kaj havos juĝadon pro diversaj akuzoj. Antaŭe bone kunvivantaj indianoj kaj neindianoj verŝajne malfacile retro-

vos pacajn najbarajn rilatojn. Kontraŭindiana rasismo aperis. Radioelsendoj eĉ bojkotis indianan rokgrupon, post petoj...

Sed plikonatiĝis kaj eble pli rapide traktiĝos la indianaj postuloj. Cetere, indiano en Kanado havas pli da rajtoj ol neindianoj. Ili povas loĝi kaj labori ie ajn, inkluzive en apartaj vilaĝoj, kie ili eĉ ne pagas imposton. Iliaj universitataj studoj estas senpagaj, sed tre malmultaj emas studi. Ili rajtas je specialaj helpoprogramoj.

Sed ilia senlaboreco estas pli alta. En multaj provincoj (sed ne en Kebeĉio, kie okazis tiu ĉi afero) ili proporcie pli multe eniras malliberejojn. Ili verŝajne estas tirataj inter la deziron monece evolui kaj tiu konservi indianecan kulturon kaj vivstilon. Ili ofte parolas pri siaj teritorioj de antaŭ kvarcent jaroj, kie nun loĝas ĉefe neindianoj, sed certe ne volus vivi kiel ili tiam vivis. Kie troviĝas la solvo?

AUCLAIR Sylvain

FEROIO

Balen-kaptado ne senbrida

En 1946 la landoj kiuj praktikis kaptadon de balenoj, decidis starigi Internacian Komisionon pri Balenkaptado. La kialo tiam estis, ke iujn balenspeciojn minacis ekstermiĝo. En la ĉi-jara kunveno (la 42a, kiu okazis junio en Nederlando) la komisiono ŝanĝis sian originan taskon: ĝi decidis iĝi ŝirmanto de ĉiuj balenspecioj. Por Feroio, malgranda insularo inter Islando kaj Britio, tiu ĉi decido estas alarmiga. Tiu ĉi malgranda socio (malpli ol 50 000 loĝantoj) tute dependas de la maro. Jam antaŭ longe la ferooj ĉesigis ĉasi balenopterojn, genron de cetacoj kiu estas minacata pri ekstermiĝo. Male, la balenon globkapan oni daŭre kaptis. Ĝia viando kaj lardo estas grava ero por la nutrado de la enloĝantaro. Nun, per la nova decido de la Komisiono, tiu kaptado estas malpermesita, sed la feroaj kaptistoj tamen daŭrigas sian laboron.

La kritikoj pri tiu daŭrigo abundas, kaj precipe britaj ĵurnaloj ne hezitas ĵeti koton al la kapo de la ferooj. La respondojn de tiuj ĉi ili tamen ne aperigas. Refuti ĉiujn malgustajojn estus ja tro longedaŭre kaj tede. Kelkajn ni menciuj tamen: La baleno globkapa ne estas minacata pri ekstermiĝo. Ĝi estas ĉasata de la ferooj nur por la nutrado de homoj. La baleno estas endanĝerigita multe pli pro la mara polucio fare de la grandaj nacioj, ol

pro la okaza kaptado de la feroaj maristoj.

Sed kritikon ne nur eligas britaj ĵurnaloj. Ankaŭ MONATO (n-ro 89/8, pĝ. 21) enhavas artikoleon pri la „senbrida kaptado de globkapaj balenoj ĉirkaŭ la Feroa Insularo“. Jam en tiu frazo troviĝas malvero. La kaptado tute ne okazas senbride; male, ĝi estas strikte gvidata de la regiona polico kaj limigita laŭ bezono. Plorinde estas konstati, ke precipe

Britio atakas Feroion, Britio kiu - ignorante adajn protestojn precipe de Nordio kaj de la insuloj norde de Skotlando - volas deponi atomenergian rubon ĝuste tie kie la balenoj vivas. Post kiam la organizajo Verda Paco ĉesigis siajn atakojn kontraŭ Feroio, ĉar ĝi konvinkiĝis pri la damaĝo kiun ĝi kaŭzis al la nordatlantikaj nacioj, estas nun precipe la brita *Whale and Dolphin Conservation Society* (Asocio por la konservado de balenoj kaj delfenoj) kiu disvastigadas mensogojn pri la balenkaptado. Ĝin gvidas ŝika komercisto kiu jam ofte pruvis, ke li ne scias pri kio li parolas.

Alia organizajo estas *Globi*, fondita de franco, kiu, kun la helpo de la feroa turisma servo, faris filmon pri la balenkaptado, kaj hejme garnis tiun filmon kun falsaj terur-efektoj.


Verŝajne la kerno de la persistaj atakoj kontraŭ Feroio estas la konstanta persekuto de malplimulto fare de la grandaj nacioj. Tiuj ĉi volas trudi siajn proprajn viv-manierojn al la malgrandaj popoloj kaj ekstermi ĉiun pluralismon. Angla kontraŭulo de la balenĉasado diris: „La angloj estas civilizitaj. Ni ne manĝas balenojn.“ Mi pli estimus tiun, kiu povus diri „Ni estas civilizitaj. Ni ne mortigas homojn.“

HENRIKSEN Jeffrey

MEDICINO

La polva puno


La komfortoj de la moderna okcidenta vivostilo pligrandigas la nombron de astmuloj, tiel ke en Kimrio, ekzemple, 9,1% de la infanoj suferis pro astmo en 1988, kompare kun 4,2% en



„Kial vi aspektas tiel? Ĉu de balenkaptado?“ – „Ne, mi naĝis ekskurson tra la forĵetaĵo de Maggie!“

1973. Centra hejtado, tapiŝoj kaj pli efika izolado kreas idealajn kondiĉojn por akaroj, kiuj estas fortaj al-ergiigiloj. Esploro dum la lastaj 11 jaroj montris, ke infanoj kvinoble pli ofte fariĝas astmuloj, se la doma polvo enhavas multajn akarojn. Eĉ pli minacataj estas infanoj de familioj, en kiu almenaŭ unu el la gepatroj suferas pro fojnofebro aŭ astmo. La konsilo estas eviti elmetadon de la bebo al la akaroj per redukto de tapiŝoj kaj aliaj ŝtofajoj en la dormoĉambro de la bebo; kovri la matracon, ĉar en matracoj troviĝas plej grandkvante la akaroj; kaj aĉeti pupojn kaj similajn faritaj el artefaritaj teksaĵoj anstataŭ el bestdevenaj.

UNGAR Krys



Perestrojko kaj glasnosto

SOCIO

Virinoj kaj perestrojko

Tutcerte inter sovetiaj virinoj estis kaj estas kaj politikaj agantoj kaj mas-trungvidantoj, kaj diplomatoj kaj sciencistoj. Tamen ties kvanto estas nekomparebla kun reala parto de virinoj en tuta loĝantaro de USSR (53 %). Jam dum kelkaj jardekoj iras kaj eĉ kreskas en rapideco procezoj de ties izoleco for de reala partopreno en politiko, precipe en t. n. „granda politiko”. En sovetia socio, kiu dum tiom longa tempo orgojlis pri sia egalrajteco, oni ĝis nun ironimokeme rilatas al la nacio mem „virina publika opinio”.

Tamen malgraŭ tio, sovetiaj virinoj havas propran opinion, kion centprocente pruvis farita antaŭnelonge tutlanda opinisondado inter virinoj. La esplorojn laŭ temo „virinoj kaj demokratio” plenumis sociologoj de akademio pri socisciencoj ĉe CK KPSU sub gvido de prof-ino Galina Sillaste. Oni pridemandis 2667 respondintojn el 10 sovetiaj respublikoj, inkluzive RSFSR (Rusio). La sondado pruvis ke „virinoj en Sovetio estas grandega politika forto, tamen dume ankoraŭ ne tre malferminta siajn eblecojn” – jen la rezultoj de la sondado. Ekzemple kiel virinoj rilatas al procezoj de perestrojko? Al la demando: „Ĉu vi kredas nun je sukceso de perestrojko?” jesis nur 10 % de l' demanditinoj, 38 % neis kaj 30 % ne povis difini sian pozicion. Kiaj estas la kaŭzoj de la vasta opinidis-ĵeto? Inter la „nekredulinoj” preskaŭ ĉiu tria malkonfidis al gvidantoj realigintaj kurson de perestrojko. Ĉiu kvina konsideras templimojn de ŝanĝoj nerealaj, ĉiu sesa ne vidas rezerveojn, necesajn por plenumo de la promesoj, donitajn de ŝtatestroj, kaj malkonfidis je realeco de planoj akceptitaj. Parto de demanditinoj (16 %) opinias ke

ununura bremsilo sur vojo de reformoj estas nedeziro flanke de parto de socio ion ŝanĝi en pasintaj ordoj. Kaj finfine 7 % deklaris ke sovetia socio ankoraŭ ne vivis ĝis kompreno pri bezoneco de la tiom radikalaj reformoj.

Kaj kiel virinoj rilatas al potencorganoj, al politikaj partioj kaj movadoj? Aŭtoritato de la Supera Konsilio de USSR (la sovetia parlamento) oni pritaksis jene: meza 34 %, malalta 18 % kaj alta 5 %. Kaj prestiĝon de lokaj potencorganoj (sovetoj) oni pritaksis kiel malalta (1/3) kaj kiel alta nur 2 % de respondintinoj. Interesaj estas pritaksoj de aŭtoritato de KPSU: ĝin taksas alte 2 %, meze 16 %, malalte 25 %, entute neas ties ekziston 17 %, kaj ne havis iun opinion 40 %. (Tute simile oni pritaksis ankaŭ prestiĝon de sindikatoj.)

Pli konservativaj

Kaj ankaŭ oni devas konsideri ke, laŭ informoj de sociologoj, virinoj kutime estas pli konservativaj, pli singarde-maj en siaj pritaksoj, ol viroj, ke ili estas pli malbone informitaj en demandoj de politika vivo (pro tio videble de 27 % ĝis 50 % da ili ne povis doni difinitan respondon al la demando). Tamen ili bone diferencigas aŭtoritaton de organizaĵo kaj tiun de ties membroj, ĉar kritike rilatante al KPSU, oni samtempe agnoskas ke komunistoj donas ekzemplon: rilate al homoj, al laboro (54 %), al infanoj (47 %), al disciplineco, organizado, principeco (38 %), de progreseco (35 %) kaj ankaŭ kiel ekzemplo de sinteno al perestrojko (39 %).

Ĉu virinoj dum perestrojko ekludis pli aktivan rolon en socia vivo de la lando? Jesis nur 11 %, neis 62 %. Pli ol duono de la lastaj kredas ke ties reala partopreno eĉ malaltiĝis, kvan-

kam oficiala propagando pruvas argumenti la tute kontraŭan.

Eterna demando: Kiu kulpas – virinoj mem aŭ la socio? Ŝajnas ke la socio, ĉar nur 9 % de la demanditinoj partoprenas en laboro de sovetoj. Ja ne hazarde 42 % parolis por enkonduki oficialajn reprezentkvotojn de virinoj sur ĉiuj niveloj de politika regado (kiel tio estis dum antaŭperestrojka epoko), ĉar la reala aliro de virinoj al potenco dum perestrojko senĉese mallarĝiĝas. Pro tio ili estas devigitaj delegi siajn rajtojn al popoldeputitoj de USSR kaj al komisionoj pri virinaj aferoj (32-37 %). 42 % el respondintinoj deklaris ke ili volus partopreni en soci-politika vivo, kaj nur 14 % ke oni ne interesiĝas pri socilaboro. Pri kaŭzoj malhelpantaj al ili aktive partopreni en politika vivo, multaj nomis mankon de racia ŝtata politiko rilate al virinoj, malfidon al ili, ties substakso. Por 40 % la tradicia barilo estas manko de libera tempo.

Do entute la perestrojko dume ne alportis multon pozitivan al virinoj, kvankam oni akceptis gravajn decidojn, kiuj devas plibonigi ties materialan staton, labor- kaj vivkondiĉojn. Tamen estas tro frue juĝi pri efiko de la decidoj. Pro tio ĉe plimulto de l' demanditinoj (ĉ. 40 %) dominas sentoj de maltrankvilo, de streĉiĝo, de malcerteco pri estonteco. Unu triono tamen daŭrigas esperi. Kaj ĉe kelkaj (de 0,4 ĝis 4 %) eĉ dominas entuziasmo, ravo kaj kontentiĝo. La proksima estonteco jam montros kiamaniere ŝanĝiĝos dinamiko kaj strukturo de la „esperanta” grupo.

NikSt

BRITIO

Politikaj senklapokapuloj

Por britaj politikistoj la aŭtuno signifas konferenco-sezonon. Unue konferencas *Demokratoj* (membroj de malgranda, centra partio); sekvas *Verduloj* (nuntempe eĉ pli malfortaj ol la Demokratoj), kaj poste la gigantoj en la brita politika arbaro – la maldekstra *Laborista Partio* kaj la ekde 1979 reganta dekstra, *Konservativa Partio*. Okazas la konferencoj kutime en marbordaj urboj, kie situas – krom kunvenejoj – hoteloj kaj pensioj por delegitoj.

Ĉi-jaron tamen kunsidis membroj de unu partio ne en iu impone ekipita banurba konferencujo, sed en ĉambro de enlanda, sudangla drinkejo. Ne temis pri partio multmembra kaj serioza: male, temis pri tute neserioza partieto, kies ĉefa „platformo” (pro-

gramo) estas malpezigi per absurdaĵo kaj ŝerco la foje pezajn, tedajn tonojn de politika vivo. Do, ekde 1963, en naciaj kaj en laŭokazaj, kromaj balotoj, kandidatis membroj de la *Oficiala Monstra Delira Senklapokapula Partio* sub gvidado de la fondinto, 49jara Krieganta Lordo Sutch [Saĉ], konata en Britio pro multkoloraj vestaĵoj kaj same ekzota cilindro ĉapelo.

La ĉi-jara senklapokapula konferenco denove montris, ke eĉ se mankas al partianoj klapoj en la kapo, tute ne mankas al ili imagipovo. Fotografiigis Sutch en korbo de granda libera balono plenigita de malpeza gaso - simbolo de „gaso“ eligita dum parlamentaj debatoj. Decidis konferencanoj „degradi“ la ministron

pri financaj aferoj, s-ron John Major [Ĝon Majĝe]: la „majoro“ iĝu simpla soldato pro liaj fuŝitaj provoj plibonigi la britan ekonomion. Kaj jen propono por hejti domojn de pensiuloj: kur-emuloj sin ekzercu en kur-energiaj centraloj por produkti elektron. La Golfo-krizo solviĝu per konstruado de pliaj golfejoj sablo-kavoj... ktp. ktp. La konferenco kaptis la atenton ne nur de britaj amas-komunikiloj sed ankaŭ de sovetia televido-raportistaro. Ĉu la gastoj komprenis pri tiu specca angla humuro, estas neklare: neniu scipovis la anglan. Tamen per interpretisto oni demandis la registaron, ĉu ekzistas en Sovetio ia senklapokapula partio. „Jes,“ li respondis, „la komunista partio“.

GUBBINS Paŭlo

da helpo ol la fieraca Usono. Usono havas nenian intereson en tiu ĉi mondoparto.

Kiel antaŭe, la rumanoj plendadas pro la abundo de mankoj ĉiuspecaj, sed ĉie oni atendis min - kiel antaŭe - kun plene kovritaj tabloj sur kiuj abundis bonajoj. La gastemo kaj respekto al gasto ankoraŭ vivas en Rumanio, kaj espereble ili plu vivos. Se varo mankas, oni aĉetas ĝin ĉe nigra merkato. „Jam plurajn monatojn ni ne aĉetis bieron, sed okaze de via vizito, ni jen faris ankaŭ tion,“ deklaris al mi amiko. „Nenia elspezo estas troa se pro gasto!“

Kaj, danke al... io, gasto mi estis. Eĉ ĉe la kluĵaj radio kaj televido (strange nomataj „liberaj“). Unu fojon pli, mi konstatis ke la emo al kono restis grandega. Edukcela scivolemo estas ankoraŭ trajto de plejparto de la rumania loĝantaro. Kia bela surprizo konstati ke averaĝaj rumanoj scias pri Usono pli multe ol la usonanoj mem! Ĉu la mito pri Usono? Eble, sed precipe la orienteŭropa scivolemo (naskiĝinta ankaŭ el plurjardeka izoligo).

Kio estas kapitalismo?

Embarasita estis mi nepovante doni informon pri la kapitalisma sistemo, kiu regas la tutan usonan ekonomion. Jes ja, la rumanoj (ne nepre ankaŭ la registaro) celas liberan merkaton kaj volas lerni pli pri tiu „fenomeno“, preskaŭ nekonata aŭ miskonata tie. Aperis en la lastaj naŭ monatoj aro da „privataj“ vendejoj kaj riparejoj, en kiuj la prezoj estas ege altaj. Oni klarigis al mi, ke tiuj prezaĉoj devenas el mankoj: la ŝtataj entreprenoj ne pretas vendi varojn al privataj vendejoj aŭ riparejoj. La bezonatajn varojn oni aĉetas el ŝtataj vendejoj (kontraŭ pli altaj prezoj), oni ŝtelas el fabrikoj (kun certaj riskoj) aŭ oni importas neoficiale (kontraŭ altegaj prezoj). Sekve, por esti profitdonaj, la privataj vendejoj kaj riparejoj aplikas nekredible altajn prezojn. „Tiuj, kiuj havas monon uzu niajn servojn“.

Jen slogano, malantaŭ kiu kaŝiĝas kompleta neglekto pri la averaĝa civitano, kiu gajnas ĉirkaŭ 150 leojn tage, dum paro de sportŝuoj Adidas kostas minimume 2500 leojn! Jes, tiaj ŝuoj ne estas nepre necesaj, sed en ŝtata ŝuvendejo mi vidis nenion escepte de bretoj kaj malfe-liĉaj vendistinoj. Ankaŭ en pan-vendejo, mi povus (ĉu?) aĉeti nur etiketojn kun prezoj, sed vendisto tute mankis. En ŝtata nutraĵvendejo, mi vidis centojn da

Denove hejme

aŭ en Rumanio naŭ monatojn post la revolucio

Jam en la malpurega vagonaro portanta min de Beogrado al Timiŝoara, mi ekremetis rememorante la fiajn rumaniajn doganistojn kaj landlimgardistojn. La ĉifonita biletkontrolisto plifortigis miajn sentojn. Mi estis enironta Rumanion post 29monata foresto kaj 9 monatojn post la tiel nomata revolucio. Ĉu io ŝanĝiĝis intertempe? La aspekto de la malrapida trajno kaj ties uzantoj estis ja konataj el miaj rememoroj. Alvenanta kun ĉirkaŭ 6hora malfruo en Beogrado, la „rapida“ trajno Bukareŝto-Beogrado suferis nenian purigadon. Ĉie spuroj de la vojaĝintoj, plejparte nigramerkatistoj al Jugoslavio portantaj ĉion akireblan en Rumanio. Reen, mi havis la „plezuron“ vojaĝi kun samspecaj uloj, ĉi-foje portantaj al Rumanio pli malpli utilajn varojn tute neaĉeteblajn en la „nova“ Rumanio.

Ĉu vere „nova“? En la stacidomo de Timiŝoara, jam sur la sepa kajo mi sentis la odoraĉon de la stacidoma necesejo, en kiu regas malumo, malordo kaj malpuro. La jam konataj komercantoj proponas al mi ĉiuspecajn varojn aŭ ŝanĝon de dolaroj en leojn (en rumana banko mi devis ŝanĝi kelkajn dolarojn por aĉeti revenbileton, kontraŭ ĉirkaŭ 20 leojn dolare; nigramerkate unu dolaro valoras minimume cent leojn!).


En unuaklasa vagono prenita ŝajne el la fervoja muzeo, mi pasigas ses horojn cele al Cluj-Napoca, kie apenaŭ spirantaj gepatroj kaj gea-

mikoj atendis min. Dum la oficialaj taksioj (kaj tarifoj) preskaŭ malaperis, ilin anstataŭis „privataj“ taksioj, kies tarifojn neniu kontrolas, kaj kiuj estas trioble pli altaj ol la oficialaj. Iun matenon, mi havis la emon uzi tramon stacidomen. Post tiu eksperimento, mi entute neglektis la urban publikan transportadon kaj mi preferas eĉ ne komenti pri tio.

Mi piedvagadis tra la urbo, por konstati ke multo ŝanĝiĝis: aperis novaj konstruaĵoj (ne malbelaj), stratoj ŝanĝis siajn nomojn, ĉie gazetvendistoj proponas al vi multekostajn periodaĵojn ne ĉiam altkvalitajn sed ĝenerale interesajn, por mi neimageblajn antaŭ, mi diru, unu jaro. La iam abundaj librovendejoj malplenas: malaperis la riĉaj verkaroj de la „granda pensanto“ kaj „fama sciencisto“. Anstataŭe, aro da religiaj verkoj kaj kelkaj libroj, private eldonitaj kaj multekostaj. Eĉ la iamaj multekostaj kaj belaj albumoj malaperis: eksterlandanoj aĉetis ilin amase, fojojn, eĉ nur por helpi enspezon de mono al la malriĉaj librovendejoj.

Tuta urbo vendejo

En la ĉefurbo, mi konstatis ke la tuta urbo iĝis vendejo. Ciganoj kaj neciganoj vendas ĉion imageblan, laŭ prezoj de ili fiksitaj kaj ĝenerale neelteneblaj de averaĝa rumano. En pluraj lokoj mi havis la impreson (kiel en Jugoslavio, fakte), ke la lokaj monunuoj estas la usona dolaro kaj la germana marko. Ŝerco, mi proponis al bukareŝta amiko, ke Rumanio aliĝu Usonon. La respondo estis tute neatendita kaj nekomentebla: Ni al Usono? La malriĉa Hungario sendis al ni pli



Malplena pan-vendejo en Cluj-Napoca

litroj da vinagro, konservitan tomatosaŭcon en giganta kvanto, ovojn laŭdire fresajn, ĉar ili neniam havas la tempon malfresigi surbrete. La iam multe revita kafo ja ne mankas nun, sed pri ĝia kvalito multaj dubas.

Dum la ĉiutagaj necesajoj estas preskaŭ neaĉeteblaj en vendejoj, la surstrata negoco ofertas al vi centojn da specoj de cigaredoj, ĝenerale el la okcidenta mondo. La rumania privata negoco aspektas al mi pli ŝtelado kaj trompado ol vera komerco. La oficiala, ŝtata komerco (se ĝi vere ekzistas) aspektas kiel iluzio. Pluraj voĉoj jam asertas ke la komerco sub Ceaușescu [ŝaŭŝesku] estis tamen ne malbona spite la ĉiutagajn limigojn kaj mankojn tiamajn.

Ankaŭ plendojn pri la malapero de la iama diktatoro mi jam aŭdis. La tiel nomata libereco en Rumanio tute ne konas respondecon kaj la politika plurismo iel similas anarĥion. „Kie estas la terura diktatoro

por senigi nin je tiuj ciganaĉoj, kiuj forrabas vin tagmeze?” aŭdis mi plurfoje. Sed, kie estas la rumania polico? demandus mi, se mi ne scius ke ĝi estus taŭga nur por PIF en Zagreb. Tiom da viktimoj faris la rumania polico en decembro kaj januaro, ke ĝi nun timas enmiksiĝi eĉ kie bezonate. Danke al dio, Rumanio havas ankaŭ ministrojn, kies bona amiko estas la dua Ceaușescu (tiuj nomas lin Iliescu).

Kaj en tiu ĥaoso, videbla (ne dumnokte, pro manko de lumo) ĉie en la lando, mi trovis kvazaŭ oazon, la Asocion de Esperanto Cluj [Kluĵ]. Mi estis tiel feliĉa rimarki la etoson inter la kluĵaj geesperantistoj, iliajn agemon kaj sindonemon, la viglan Esperanto-movadon tie, ke mi eĉ forgesis ke kelkcent metrojn fore, mia bonega amiko mortis pafita de soldato en decembro. Li mortis por libereco en la Placo de la Libereco. Ĉu vane?

ONET Ionel

EKONOMIO

Kiu sovetiano volus labori eksterlande?

La plej populara anekdoto en Sovetio lastatempe estas jena: Homo demandas sian amikon: „Se oni malfermos limojn kaj permesos al ĉiu libere forveturi eksterlanden, kion vi faros?” La amiko tuj respondas: „Mi elektos la plej altan arbon kaj tuj surgrimpos ĝin.” – „Pro kio?” – „Por ke oni min ne piedpremu kiam oni amase ekkuros tien!”

Ŝajnas ke la situacio jam realiĝas, kvankam oni ĝis fine de aŭgusto ne

akceptis leĝon permesantan al sovetianoj libere vojaĝi eksterlanden.

Kiel okazis, vorto „elmigrintoj” en biologio signifas „bestoj migrantaj ekster limojn de sia areo pro manko/deficito de manĝaĵoj en sia kutima loĝloko”. En naturo plej ofte okazas translokiĝoj de lemingoj, de sciuroj, de papilioj, de libeloj. Ĉe homoj la procezo iras iom pli malsimple. Sufiĉe malofte oni strebas en fremdajn landojn por dolĉa kuko (por tiuj „kosmopolitoj” ja efektive

estas: *Ubi bene, ibi patria* – Kie estas bone, tie estas patrolando; i. a. la esprimo unue aperis en komedio de Aristofano „Riĉaĵo” en 445-385 a. K.). Pli ofte homon forpelas de nasklando sento de psikologia malkomforto, malcerteco je morgaŭo, kaj foje mal-espero de homo, jam laciĝinta puŝiĝi je muroj. Bedaŭrinde nome tiuj ĉi kondiĉoj – ĥaoso en ekonomio, interetna streĉiĝo, kaj precipe treega malcerteco pri estonteco – puŝas homojn almenaŭ pripensi: Ĉu eble mi kraĉu al la senĉesaj problemoj kaj forveturu eksterlanden?

La humoroj nun estas tiom fortaj ke sociologoj atentis la fenomenon. Antaŭnelonge VCIOM (Tutunia centro pri publika opinisondado) faris respektivajn esplorojn kiujn oni elegante titolis „Rilato de loĝantaro de USSR al laboro eksterlande”. Kiel okazis, tuta kvanto da homoj dezirantaj forveturi eksterlanden por labori tie, estas sufiĉe granda – ĉ. 8 % de l' demanditoj. Certe, plej ofte esprimas la deziron junularo: 15 % de l' demanditoj estas je aĝo ĝis 29 jaroj, 10 % inter 30-39 jaraĝaj kaj nur 3 % havas pli ol 40 jarojn. Inter ili 27 % estas personoj kiuj havas altan (ankaŭ difinitan altan) klercon, 34 % tiun de meza speciala klerco kaj (meza) faka klerco, 23 % kiuj finis mezlernejon (ĝenerala meza klerco) kaj 16 % kiuj ankoraŭ eĉ ne finis mezlernejon.

Abstraktaj deziroj

Absoluta plimulto (95 %) estas urbanoj. El ili la deziron esprimas ĉiu sesa (16-17 %) loĝanto de grandaj urboj (Moskvo, Leningrado, kaj ĉefurboj de uniaj respublikoj), ĉiu dekdua (8 %) loĝanto de mezaj kaj malgrandaj urboj, kaj nur unu el 50 (2 %) de kamparanoj. El ĉiuj kvin dezirantoj du (40 %) laboras nun en produktiva sfero (industrio, konstruado, transporto) kaj ankoraŭ tiom multe (39 %) en kampoj de scienco, kulturo, klerco kaj sanprotektado.

Tamen entute laborantoj de sociokultura sfero esprimas la deziron duoble pli ofte ol tiuj de industrio kaj de aliaj neproduktivaj branĉoj (komerco, manĝejoj ktp.) – resp. 14 % kaj 7 % de l' demanditoj en la grupoj. Pli ol duono de l' dezirantoj (labori eksterlande) apartenas al fakoj de servoj kaj tekniko (39 %) aŭ al kvalifikita laboristaro (19 %). Ankaŭ sufiĉe granda estas parto de oficistoj (26 %). Nome reprezentantoj de la lasta grupo pli ofte ol aliaj volus forveturi eksterlanden – tion indikas ĉiu sepa el ili (14 %); inter „inteligentuloj” ĉiu deka (10 %) kaj inter kvalifikita laboristaro nur ĉiu dudeka (5 %).

Verdire ĉe multaj la deziro estas sufiĉe

abstrakta – nur unu el 10 dezirantoj (11 %) pretas forĵeti tuj sian laborlokon, tamen plimulto (40 %) nur „pri-pensas” tion.

Pri motivoj de la strebado oni povas vidi en apuda bildo (en procentoj de tuta kvanto de demanditoj en ĉiuj grupoj; la sumo estas pli ol 100 %, ĉar la demanditoj povis elekti samteme kelkajn variantojn de respondo).

Do, surbaze de la informoj oni povas kun sufiĉe granda probableco paroli pri tuja pretenco al porlabora elmigrado de ĉ. 1,6-2,0 milionoj da sovetianoj kaj pri ekzisto de kontingento ankoraŭ ĉe 4,8-6,0 milionoj da homoj, aktive „pri-pensantaj” la eblecon. Tremu do la okcidento!

NikSt

SURINAMO

Vizito al fantoma urbo

Fantomaj urboj estas urboj kie restas domoj, sed ne homoj. Ili ekzistas interalie en la regionoj kie oni iam forsis oron sed nun ne plu. De pli ol du jaroj la ĉarma urbeto Albina en Surinamo (norde de Brazilo) estas tia fantoma urbo, sekve de la milito en tiu lando. En julio 1986 la ribelanta kaporalo Ronnie Brunswijk [Roni Brnsvejk] formis armeeton de mal-kontentuloj kaj decidis kontraŭbatali la milit-istaran reĝimon de komandanto Desi Bouterse [Boŭtrse], kiu tiam regis la landon. En septembro pasintjara tiu gerila armeeto atakis la urbon Albina kaj invadis ĝin. Ĉiuj loĝantoj fuĝis, aŭ trans la riveron Maroni (aŭ Marowijne) al Franca Gujano,



Per kio allogas vin laboro eksterlande? – Per bona salajro (62 %). – Tie ekzistas ebleco okupi indan lokon en socio (13 %). – Tie oni povas realigi siajn sciojn kaj kapablojn (56 %). – Tie oni povas montri iniciaton (7 %). – Finfine mi volas labori inter samideanoj (11 %).

aŭ trans la maron al la ĉefurbo Paramaribo, aŭ tra la ĝangalo kien ajn. En la postaj semajnoj ŝtelemuloj el la regiono venis kaj forportis ĉiajn valoraĵojn, detruinte pordojn kaj fenestrojn por atingi la deziratajn objektojn. Kvankam de januaro 1988 demokrate elektita registaro estras la landon, la gerila armeo ankoraŭ postvivas kaj ĝi daŭre endanĝerigas la vivon en orienta Surinamo. En Albina mem nun vivas nur malgranda armea taĉmento por kontroli tiun landliman lokon. La albinanoj (ĉ. 3000) vivas dissemataj tra la lando aŭ en Franca Gujano, atendente la tagon kiam ili povos reiri al sia urbo. Sed intertempe la ĝangalo invadas ĝin... Siatempo Albina estis unu el la plej ĉarmaj urboj de Surinamo. Situante sur la bordo de la rivero Maroni, vid-

alvide de la urbo Saint-Laurent [Selorá] en Franca Gujano, ĝi estis la trafika urbo, ne nur pro la pramo, sed ankaŭ pro la komerco laŭlonge de la rivero. Ekzistis kelkaj hoteloj kaj agrabla banejo. Loĝantoj de Franca Gujano venis tie por butikumi dum la surinamanoj reciprokis la viziton por tie aĉeti francan vinon. La indianoj kaj la arbarkreoloj el la regiono venis tien por provizi sin aŭ por vendi siajn artaĵojn. En la pasinta jarcento Albina estis centro de forstistoj kaj de orserĉistoj. Ĝi estis fondita de kelkaj germanoj sub la gvido de August Kappler, kiu nomis la urbon laŭ sia edzino Albina.


Ploriga bildo

Depost marto 1988 la armeo permesas ke oni iru al Albina, sed je propra risko. Necesas unue havi permeson de la militistara polico en Mungo, la urbo tuj antaŭ la danĝera zono. Kvar-ope ni vojaĝis tien por konstati la staton de la malsanulejo, de la farmaciejo kaj de la infanternejo. Survoje ni devis multe atenti la truojn, kiuj postrestas pro eksplodintaj obusoj. La detruitaj pontoj estas parte riparitaj sed ankoraŭ danĝeraj. Jen kaj jen vidiĝas detruitaj kabanoj de indianoj. La tuta regiono estas senhoma. En la urbo mem la falintaj telefonfostoj kuŝas sur la pavimo kaj iliaj dratoj malebligas pluveturon. Arbustoj kreskas en la pordaperturoj kaj lianoj in-

1. En Surinamo la termino kreolo estas uzata por la posteuloj de la iamaj afrikaj sklavo, jes aŭ ne miksitaj kun eŭropanoj, indianoj aŭ aliaj. Aparta grupo inter ili estas la arbarkreoloj kiuj estas la posteuloj de fuĝintaj sklavo, kiuj en la arbaro realprenis sian afrikan vivmanieron.



Oni devas pasi trans detruitaj, sed iom riparitaj pontoj.



La detruita hotelo estas jam parte invadita per la herbaro (maldekstre); indiana familio estas reveninta kaj vivas en la lernejo.

vadas la ĉambrojn. Simioj saltas sur la tegmentoj de unu domo al la alia. Ĉie estas nigraj vulturoj. Nia aŭtomobilo forpelas aron da ili, kiuj estis manĝantaj la kadavron de granda serpento. Kiam ni alproksimiĝas al la internulejo, unu inter ni preskaŭ ploras kiam li vidas la instituton kiun li dum jaroj gvidis kaj kie li edukis centojn da infanoj el la regiono. La detruita kluzo enlasis riverakvon je alta tajdo. Eĉ nun parto de la ĉambraro estas sub-akviĝinta. La korto de la lernejo estas vera marĉo. La fiherbaro kreskas ĉie kaj abunde kvakas la ranoj kaj la bufoj. Jen kaj jen rato forkuras. En la iama direktora ĉambro de sub ŝranko forkuras igvano, unu metron longa. Sur la lampo sidas migalo, giganta araneo, kun abomena hararo.

En la hospitalo regas simile deprima bildo: La tuta korto kovriĝas per altaj fiherbajoj. Pordoj kaj fenestroj estas detruitaj. Ĉio kio ne pezis tro multe estas for: seĝoj, littukoj, kovriloj, medikamentoj... Kiu faris? Ĉu la gerilanoj? Ĉu la armeaj soldatoj? Ĉu la postaj ŝtelistoj? Multekostaj aparatoj rustas. En la akuŝa ĉambro sekiginta sango, supozeble de virino kiu nas-kis tuj antaŭ la fuĝado. En la farmaciejo rompita boteloj, disŝutitaj piloloj, kaj granda truo en la muro pro eksplodinta obuso.

Ekster la urbo oni povas dummomente forgesi la ĉagrenon. Sed kiam ni vidas la agronomian kampon de Erwart, kie unu el niaj amikoj iam instruis al la indianoj kiel kultivi legomojn, ni denove silentas: la ĝangalo komplete invadis ĝin. Feliĉe la apuda indiana vilaĝo iom vivas. Iuj fuĝintaj indianoj intertempe revenis per kano kaj nun provizore vivas en la lernejo de la vilaĝo. Ili almenaŭ havas solidan tegmenton super la kapoj, atendante pli bonajn tempojn, kiuj eble neniam venos.

DE SMET Wim

SOCIO

Obskuraj radikoj de la Luma Epoko

La honoran titolon „ĉefurbo de la movado” la germanaj faŝistoj atribuis al la bavara urbo Munkeno, kie ekfloris la nazia movado en la 20aj jaroj de nia jarcento. Hodiaŭ en ĉi tiu urbo viglas alia movado: Ekzistas proksimume 100 esoteraj centroj, institutoj kaj organizoj akurate listigitaj en revuo, kiu havas la signifoplenan titolon „Lichtblick – spirita revuo por Munkeno kaj Bavario”. (Lichtblick estas dusenca: ekrigardo de lumo; radio de espero/konsolaĵo.) Troveblas Balkrishan-, Surat Shabd aŭ Abaton-Centro, same kiel Kensoh-, Korak-, Janus-, aŭ Theta-Instituto, oraklo-metiejo, tantra alĥemio, diversaj institutoj por spirita resanigo, reenkariga terapio. Terminoj, plej ofte anglaj, estas uzataj kiel „reiki, aura-reading, mind-clearing, pulsation aŭ wing-song”, laboro je la „Chakren”, je la „Plej Alta Memeco”, je la energicentralo subkonscio, kontakto kun mortintoj aŭ gardospiritaj, neidentigitaj flugobjektoj kaj eksteraj estaĵoj, evoluo de parapsikologiaj kapabloj per la helpo de kristaloj, pendoloj, divenaj vergoj, per astrologio, numerologio, klarvido, taroto, kapablo aŭ runoj.

Kion precize signifas ĉi tiu miksaĵo, kiu ĝenerale aperas sub la etiketo „New Age” (nova epoko) aŭ lastatempe „Light Age” (luma epoko)? Ĉu la tuto nur estas sensencaĵo, kiu ne indas pritrakton, aŭ ĉu estas necese serioze pristudi ĉi tiun movadon precipe pro ĝia strategio stultiĝi la amasojn? La tiel nomata „nova pensmaniero” atingis timendan amplekson: Proksimume 20 % de la novaj libroj dum lastaj jaroj estis el la kategorio „New Age” kaj esoteriko – kaj la nombro ankoraŭ kreskas. Kursoj estas ofertataj eĉ en popol-altlernejoj.

Kio do estas la ideologio prezentata al la popolo sub etiketoj kiel „Kosma Konscio” aŭ „Nova Epoko”? La adeptoj de „New Age” sin komprenas kiel avangardo de tute nova, neniam antaŭe ekzistinta pensmaniero. Sendepende de la fakto ke utopiaj projektoj pri iu nova epoko estas troveblaj en la mitoj de ĉiuj popoloj sur la terglobo, la ideoj kunmetataj en „New Age” tute ne estas novaj aŭ originalaj: Ĉefe ili devenas el idearo de la „teozofio”, miksaĵo el ŝajne raciaj kun mistikaj, okultaj scioj, trovebla ĉe la neoplatonanoj (2a ĝis 6a jarcento de nia tempo) kaj precipe en la kristana „gnostiko” kiu estis influata de ili.

Teozofiaj ideoj estas rimarkeblaj tra la tuta mezepoko ĝis nia tempo kaj speciale aperis fine de la 18a jarcento en la skribaĵoj de la t. n. „spiritistoj”, kiuj ĉefe celis kontakti la animojn de mortintoj. Kiel kontraŭa movado al revoluciaj ŝanĝoj en la eŭropa socio, la spiritismo atingis sian kulminon fine de la 19a jarcento: Ĉie aperis memfaritaj medioj kiuj transdonis mesaĝojn el la transejo, okazis seancoj kun tablo-moviĝo kaj rigardo en la kristalan globon. „Recidivo en la primitivan superscienco” juĝis Friedrich Engels [Fridriĥ] en publikaĵo el jaro 1878.

Sekreta doktrino

En la jaro 1888 publikigis Helena Blavatski, denaske rusa, sian fundamentan teozofian verkon „La sekreta doktrino”, kiu estis sendata al ŝi en spiritisma maniero de nevideblaj himalajaj spiritoj. Ĉi tiu kunmetaĵo el orientaj kaj okcidentaj esoteraj tradicioj, miksitaj kun evoluismaj kaj aristokrataj teorioj pri la deveno de la homo, rapide iĝis la baza verko de eŭropa okultismo. Preskaŭ ĉiuj postaj verkoj de teozofio

kaj nuntempe de „New Age” estas maksimume variantoj de la jena mondkoncepto: En certa loko en Himalajo troviĝas la surtera kontaktejo de la „Granda Blanka Kongregacio”, loĝio de lumigitaj majstroj al kiuj apartenas krom Kriŝno, Budho kaj Jesuo Kristo inter alie Sankta Francisko de Assisi, Leonardo da Vinci [Vinĉi] kaj Johann Wolfgang von Goethe [Volfango fon Gete]. La kongregacio servas al la galaksia hierarkio, kiu sekrete observas la vivon de la homoj sur la tero, kaj kiu ricevis meze de la 19a jarcento la ordonon gvidi la homaron en „Oran Epokon”. La necesaj esoteraj sekretoj estas malkaŝataj al ĉiuj homoj, kiuj pretas kiel „lumagantoj” realigi la novan mondordon.

La elektitaj homoj devas servi kiel mediumoj por la mesaĝoj de la majstroj, leviĝintaj en nirvanon. La realigo de la „nova epoko” estas privilegio de la plej progresinta raso: la arjanoj. Tial la formorto de la subaj rasoj (indianoj, papuoj, eskimoj, aŭstralianoj) estas karma neceso.

La ekstreme dekstra „Teozofia Societo” fondita 1875 de Helena Blavatski en Novjorko liveris kun tiuspecaj rasismaj ideologioj la volonte akceptatan apologion por la amasmurdoj de la imperiismo en la tria kaj kvara mondoj. Komence de la 20a jarcento la Teozofia Societo, kiu intertempe ŝanĝis sian nomon al „Adyar TG”, havis loĝiojn kun pli ol 100000 membroj en proksimume 50 landoj kaj rimarkindan politikan influon. En la jaro 1907 Annie Besant, disĉiplino de Blavatski, iĝis prezidantino de la societo, kiu ekde nun spertis imponan prosperon. Komisiita de la „Commonwealth” ŝi transprenis la prezidon de la hinda nacia kongreso, kie ŝi baldaŭ ekkverelis kun Gandhi pro ŝia teozofia doktrino pri rasoj, el kiu ŝi divenis la konservadon de la kastoj.

Antropozofio

Alia pioniro de la nuntempa „New Age” estas Rudolf Steiner, kiu komencis sian esoteran karieron kiel ĝenerala sekretario de „Adyar TG” en Germanio. Li forlasis la organizon en 1913, ĉar li ne pretis partopreni en la kulto postulata de Annie Besant, por prezenti Jiddu Krishnamurti kiel novan Kriston. Steiner fondis „Antropozofian Societon”, kiu enmetis diversajn sociajn kaj humanismajn elementojn en la teozofian doktrinon. Sed li konservis la ideologion de la supereco de la german-norda raso.

Krom Steiner menciindas precipe Annie Alice Bailey, kiu aliĝis en 1915 al la kalifornia loĝio de Adyar TG. Kiel mediumo ŝi ricevis personajn mesaĝojn de la Granda Blanka Kongrega-

cio. Ŝi plilongigis la membroliston je kelkaj pliaj lumigitaj personoj: Napoleono, Bismarck, Mussolini, Hitler, Stalin kaj Franco [Franko]. La reakcia interpretado de la doktrino pri la karmo atingis sian kulminon: socia mizero ĉiukaze estas kaŭzata de kulpoj en antaŭaj vivoj. La amasmurdo de la tria regno estis, eĉ poste, pravigita: la juda gento estis devigata perlabori sian malfavoran karmon kaj la nazioj nur helpis al ili.

Tria regno

La nazioj siaflanke, evidente, montris grandan intereson pri la teozofia elita doktrino pri rasoj. En Germanio kuniĝis reakciaj grupoj el la industrio, nobelululoj kaj oficiroj jam en la respublikala periodo inter 1918 kaj 1933 en sekretaj loĝioj, kiuj celis kaj detrui la junan demokration kaj realigi la arjan epokon. La plej grava grupo estis la tuleo-ordeno, fondita 1918 en Munkeno, al kiu apartenis poste eminentaj

LABORO FORTIGAS, RIPOZO PUTRIGAS (Proverbaro Esperanta)

En brita bestoĝardeno studentino eksperimentis kun du belaj leopard-katoj - sovaĝaj katoj, leopardede makulitaj, el Hindio. Bandar, la virkato, ronde paŝadis konstante: Lhasa, la katino, konstante kuŝadis, tro dormadis. Kiel kutime en brita bestoĝardeno, oni tre bone kaj serioze prizorgis tiujn bestojn kaj ilia fizika sanstato estis tre bona; sed ili ŝajnis sen intereso pri la vivo, kaj ne multe purigis sin mem. Oni ĉiam donis al ili la ĉiutagan viandon en amaso sur la grundo.

Veterinarscienc-studentino Clare Knowler [Kler Nole] komencis prezenti al ili problemojn: ŝi pendigis viandon de la plafono, kaŝis ĝin en ujoj kaj sub diversaj objektoj, tiel ke Bandar kaj Lhasa devis serĉi ĝin. Foje ili devis elpensi metodojn por tiri ŝnuron, salti supren kaj kapti la manĝon, serĉi ĝin flare; kiam ili lernis unu solvon, Clare kaŝis la viandon pli malfacile. lasence, tiuj bestoj devis denove serĉi „predon” por manĝi.

Kaj Lhasa iĝis multe pli vigla kaj aktiva: la maŝineca paŝado de Bandar ĉesis; tiuj leopard-katoj multe pli purigis sin, kaj ŝajnis pli ĝui siajn manĝojn. Eble plej interese, kiam ili havis naturecan „laboron”, ilia interrilato videble pliboniĝis!

BOULTON Marjorie

nazioj, ekz. Himmler kiu sin komprenis kiel reenkarmoniĝon de „Henriko la leono”, Hess kaj Rosenberg. La tuleanoj revis ke purrasaj arjaj superhomoj regu la mondon. La komenco de la arje-spirita „nova epoko” estis ankaŭ malhelpata de la mallumaj rasoj (judoj, nigrujoj, ciganoj), kiuj pro tio estus forigendaj. La mesio de la nova epoko estu Hitler. Tutcerte la naziismo inter alie radikis en teozofiaj doktrinoj.

„New Age” hodiaŭ

Trompitaj estis tiuj kiuj pensis ke post la fino de nazia barbareco ankaŭ la teozofiaj fantomoj estus forpelataj: Ekde la 70aj jaroj ĉi tiuj doktrinoj spertas renesancon, transcendeĉaj ĝuas florantan konjunkturon. Nekredeblaj stultajoj, ekz. de Shirley MacLaine, de Chris Grishom, Joseph Murphy aŭ Thorwald Dethlefsen pri la kontaktoj kun spiritaĵoj aŭ al plej alta memeco aperas en specialaj esoteraj serioj de grandaj kaj renomaj eldonejoj (ekz. Goldmann, Heyne, Knauer). Ili estas milionoble aĉetataj. En preskaŭ ĉiujn kampojn de la socia vivo la „New Age”-idearo povis enpenetri. Precipe la tiel nomata psiko-scenejo estas subfosata, rimarkeble je la granda nombro de esotere orientataj kuracejoj. Tre ofte estas aplikataj efikaj, do riskaj psikaj teknikoj kiuj povas havi fatalajn sekvojn en la manoj de malspertaj terapeŭtoj. La plej multaj „New Age”-terapeŭtoj ĝuis neniu kvalifikan edukon. Ili agas en jure nedifinita regiono, kiu permesas al ĉiuj uzi la titolon „psikoterapeŭto”. Kio okazas sub la etiketo „spirita terapio”, kutime estas harstariga sensencaĵo.

Ankaŭ la ekologian movadon influis la esotero: oni provas kunveni en „lokoj de fortoj” kie oni surscenigas pseŭdoŝamanajn rituarojn por efektiviĝi la „repacigon kun patrino tero”. Trafemaltrape oni ekspluatas la tradiciojn de ĉiuj kulturoj: keltajn kaj ĝermanajn tradiciojn same kiel indianajn kaj tibetajn. Nur gravas ke la tuto havu iom da mistika aspekto kaj ke la unuopulo sin povas imagi iel kiel „parto de la tutaĵo”. La limo al la „sango kaj grundo”-ideologio de la nazioj estas malfacile rekonebla.

Ankaŭ la „Granda Blanka Kongregacio” ŝanĝiĝis: hodiaŭ eĉ indianaj tribestroj, mortintaj kompreneble, ĝuas la honoron. El kosmaj sferoj sin anoncas la irokezo „Blanka Aglo”, kies ege reakciaj mesaĝoj intertempe plenigas kelkajn librojn. Ekzemple li diras: „Saĝa homo estas maltrankviligata per nenio. Li scias ke la dia leĝo estas justa, perfekta kaj vera, kaj ke ĝi regas ĉiuj erojn de la homa vivo. Ne plendu kaj ne estu malkontenta pri via sorto. Kiam vi lernas akcepti vian karmon,



ĉar vi lernis ke nur per tio vi povas venki, vi vivos pli facile kaj pli feliĉe." La spirita mesaĝo de „Blanka Aglo” estas en formo de libro same bone vendeblaj kiel la skribaĵoj de Charles W. Leadbeater, kiu deklaras la formorton de la naturaj popoloj kiel karma neceso, ĉar ni kiel pli alte evoluintaj animoj transiris ilin.

Kompreneble la homaro ricevis ankaŭ la atombombon de la Granda Blanka Kongregacio kiel donacon por batali kontraŭ la malbono. Ĝi estu nepre necesa por la konstruado de nova monda ordo, en kiu la arjaj rasoj regos. G. Trevelyan en Findhorn diris en 1983: „Post nuklea milito la tero povos renaskiĝi en nova beleco kaj homaj animoj povos malsupreniri, esti fekundaj kaj plimultiĝi.”

La hodiaŭaj reprezentantoj de la „Nova Pensmaniero” konservas kaj daŭrigas la reakcian ideologion de la teozofio. Kompreneble ili ne rekte propagandas la ekspluatadon de la popoloj en la tria kaj kvara mondoj. Ili ne laŭte diras ke la mizeraj kvartaloj estas lokoj kie amasiĝas malsupraj animoj kaj tie nur estas juste traktataj. La rasismo, antisemitismo, faŝismo restas kovrata. Nur de tempo al tempo oni ekscias pri la vera spirito, kiu estas malantaŭ la honesta fasado de fumbastonetoj kaj meditado.

En aŭstra televidelsendo la „New Age”-guruo Erhard Freitag [Frajtag] asertis ke la 6 milionoj judoj, kiuj estis

mortigitaj en germanaj koncentrejoj, nur pentis pro pekoj en pli fruaj vivoj. Similan teorion prezentis Rainer Holbe, parolanto de luksemburga radiostacio RTL komence de 1990 en libro, kiu aperis en la granda eldonejo Knaur kaj kiu estis diktita de du spiritaĵoj al li.

Bone: la terapiejo de Freitag en Munkeno intertempe estas fermita, Holbe perdis sian postenon – sed multaj aliaj povas sub la pretendo de la „spirita serĉado por lumo kaj amo” daŭrigi sian reakcian, por ne diri faŝisman entreprenon por stultigo de la homoj. SCHNELL Roland


Terminologiaj rimarkigoj: La redaktantoj de PIV evidente ne konsciis pri la reakcia esenco de la teozofio, ĉar ili erare klarigas ke temas pri „sinkretisma doktrino, celante per nenaciaj intuaj procedoj havigi scion pri dio kaj vivsignifo, kaj elvolviĝon de metapsikaj kapabloj; ĝi ankaŭ predikas, same kiel la Zamenhofa homaranismo, la universalan, homaran fratecon sen distingo pri religio, kredo, sekso aŭ raso.” – La termino „antropozofio” ankoraŭ ne troviĝas en PIV, sed uzante la prefikson „antrop” oni facile kreas ĝin el „teozofio” paralele al la historia evoluo.

TEKNIKO


Telefonkarto limigas vandalismon

Detruado de publikaj telefon-aparatoj estas la ŝatokupo de multaj gejunuloj nuntempe. En Britio ĉiu telefonilo en ĉelo estas detruita meze tri fojojn jare. En Svislando ekzistas aŭ pli fortikaj telefon-aparatoj aŭ malpli da vandaloj ĉar tie oni detruas meze nur unu aparaton jare. En Belgio la junuloj ŝajnas esti tute trankvilaj, ĉar tie ili atakas telefon-ĉelon nur ĉiun kvaran jaron.

Belga telefon-kompanio tamen ne kontentis pri tiu ĉi favora situacio. Konstatinte, ke plejofte la instigo de la vandala agado estas la moneroj en la aparato, ili ekde 1979 iom post iom



Ĉu tiu ĉi Esperantlingva telekarto estos uzata en belgaj telefonĉeloj? La plimulto supozeble tuj eniros la albumojn de kolektantoj, neuzata.



Ĉiun kvaran jaron la belgaj publikaj telefoniloj estas atakataj de vandaloj kiuj volas akiri la monerojn.

instalitis en la ĉeloj telefonilojn kiuj konsumas ne monerojn sed funkcias per plasta karto. La karton oni nomis telefonkarto aŭ mallonge telekarto. Ĉiu kiu ofte uzas la publikan telefonon portas ĉe si etan plastajon per kiu oni povas voki difinitan kvanton da fojoj. Ekde 1990 ankaŭ aperas telefoniloj kiuj akceptas kreditkartojn. Vi ne pagas ion ajn en la momento de la voko sed iom poste via bank-konto estos debetita per la kostoj. Montriĝas nun, ke ju pli oni uzas telekartojn kaj kreditkartojn, des malpli okazas vandalaĵoj en la ĉeloj. La belga telefon-kompanio do sukcesis ŝpari grandajn sumojn.

Sed neatendite ĝi povis ŝpari monon ankaŭ alimaniere. Multaj kartoj estas acetataj sed tute ne uzataj. Ili tuj eniras albumon de telekarto-kolektantoj, kiuj, same kiel la poŝtmarko-kolektantoj, pretas elspezi multe da mono por posedi ĉiun aperintan ekzempleron. La albumo de la Esperanto-telekarto-kolektantoj provizore povas esti malgranda, ĉar, kiel ni en MONATO jam raportis (n-ro 90/7, pĝ. 23) ekzistas nur du telekarto kun teksto en Esperanto: unu japana kaj unu belga. pp

MONATO

ideala ankaŭ por reklami la internacian lingvon. Ĉu via klubo jam abonas ĝin, por konstante havi aktualan propagandilon – MONATO?

La Ciotat, ĉu morto aŭ turismo?

La Ciotat [La Sjotá] situas sude de Francio, oriente de Marseille (Marsejlo). Ĝia golfo estas bone protektita kaj jam la romianoj instalas havenon. Sed ĝi ekfloris en 1878, kiam kreiĝis ŝipkonstruejo. Kaj la tuta posta vivo de la urbo ligiĝas al konstruo de ŝipoj manfaritaj unue kaj poste per moderna maŝinaro fare de diligenta kaj kompetenta laboristaro, kiu laboras tie de pluraj generacioj. „Krei el feraĵo finitan, majstran ŝipon donas la saman plezuron, kiel koto al skulptisto“, deklaris laboristo.

Azia konkurenco kaj eŭropa decido

Fronte al konkurenco de ŝipkonstruejoj en Japanio kaj Koreio, eŭropaj instancoj decidis, ke ne plu necesas tiom da ŝipkonstruejoj en la 12landa Eŭropo. En 1982 grupiĝis la francaj nordaj kaj mediteraneaj konstruejoj kaj kreiĝis firmao Normed. Tiam la ŝipriparejo en la Ciotat dungis eann laboristojn kaj tenis unu miliardon da francaj frankoj enkase. Aldoniĝis la konstruejoj en Dunkerque [Denkerk] kaj La Seyne [La Sejn] kaj en 1986, pro tro granda defecito firmao Normed ĉesas funkcii. La tiam ministro pri industrio, Alain Madelin [Alén Madlén], decidis fermi la konstruejon. Du elektoj estas proponitaj al la laboristoj: lerni duan metion dum 24 monatoj aŭ ricevi kapitalon de 200 000 francaj frankoj. La „foriro“ estas planata laŭonde laŭ la restantaj laboroj (finkonstruo de du meksikaj naftotransportiloj). La 6an de oktobro 1988, 530 laboristoj okupas la konstruejon kaj malpermesas la liveron de la lasta ŝipo *Le Monterey*. En februaro 1989, 48 laboristoj haltigas ĉion en la haveno.

Industria felietono

La 13an de aprilo 1989, televidelsendo permesas organizon de „ronda tablo“ en kiu partoprenas la registaro, la sindikatoj, la regiona kaj departamentaj konsilioj. Ĝin sekvas subskribo de kontrakto la 2an de junio 1989.

Tiam la aferisto-deputito Bernard Tapie [Bernár Tapi] kiu famiĝis ĉe aĉeto de bankrotintaj firmaoj, kreas novan firmaon kaj dungas 350 laboristojn por lanĉi riparejon de jaĥtoj. La propono de alia kandidatiĝanta firmao Lexmar [Leksmar] estas rifuzita kaj forĵetita.

La 1-an de septembro 1989, la nova firmaestro Tapie dungas 105 homojn,

sed la konstruejo/riparejo ne malfermiĝas pro la propono de Lexmar reaĉeti de la ŝtato la ejon.

Pro ne tro klaraj subaj kialoj, la ŝtato vendas la maŝinaron al la banko Worms, kiu revendas ĝin al agentejo UNIFAM. Komenciĝas proceso kontraŭ Tapie. Lexmar, tra sia prezidento Adam Backstrom [Bakstrom] (svedo, loĝanta en Usono) proponas redungi la samajn homojn kun la samaj avantaĝoj proponitaj de Tapie.


Laŭ la leĝo pri malcentralismo, la regiona konsilio voĉdonas por la malfermo de la ŝipkonstruejo.

La 22an de decembro 1989, la regiona konsilio lasas al Lexmar sesmonatan ĝuon de la loko por rehavigi de la ŝtato la maŝinaron. La ŝtato rifuzas.

La 8an de januaro 1990, Lexmar redungas la 105 laboristojn kaj komenciĝas nova batalo por rehavi la maŝinaron. La ministro pri industrio, tiam socialisto, Fouroux [Furu] kaj lia vicministro Chérèque [Ŝerék] persisteme rifuzas.

La 18an de julio 1990, la regiona konsilio lasas al Lexmar 30-jaran ĝuon por funkciigi la konstruejon. La franca ĉefministro Rocard [Rokár] restas ĉe sia pozicio pri fermo sed promesas respekti la leĝan malcentralismon, kaj ne kontraŭstari la kontaktojn inter Worms kaj Unifam por ke ili redonu la maŝinaron al Lexmar.

Restas nun la espero malfermi ĉar estas menditaj de Italio 4 naftotransportiloj kaj eblaj 8 pliaj.



Memortabulo pri la unua filmo farita en la stacidomo fare de fratoj Lumière.



Senviva haveno

Urbo sen vivo

Tiu vivoplena urbo, kiu vivis laŭ la ritmo de la ŝipkonstruejo, estas mortanta. Ne plu aŭdiĝas la sireno, kiu ritmis ne nur la laboron en la konstruejo, sed la tutan vivon de la urbo. La laboristoj, kiuj ricevis 200 000 francajn frankojn por vivteni sin dum du jaroj, ĝis ili retrovos laboron, tro ofte elspezis ĉion tuj, aĉetante luksan veturilon aŭ televidilon. La senlaboruloj, kiuj dum la du unuaj jaroj ricevas monkompenson, nun finis tiun helpon, kaj 2500 familioj estas senmonaj. Multiĝas la eksedziĝoj. Kuracistoj vidas novan kategorion de malsanuloj pro psike provokitaj malsanoj. La instruistoj ne scias komence de la jaro kiom da gelernantoj estos kaj kiom da estos translokigitaj. La fluantaj salajroj, kiuj nutris la vendejojn, kafejojn, metilaborejojn, ne plu cirkulas. La butikoj fermiĝas. Je la 7a vespere, pro manko da klientoj, ĉio fermiĝas kaj la urbocentro endormiĝas. Kelcento da laboristoj retrovis laboron en la proksimeco sed estas dungitaj sub la nivelo de la minimuma salajro; aliaj entreprenis funkciigi propran entreprenon aŭ komercon sed sensperataj en senmonaj cirkonstancoj, ili bankrotas. Por venigi aliajn entreprenojn estis kreita t.n. „zono“, kie entreprenoj ĝuas favorajn kondiĉojn (ne pagas impostojn k.s.). Sed konstatigas, ke anstataŭ krei postenojn kaj dungi lokajn laboristojn, entreprenoj vojaĝas de zono al zono kun sia dungitaro kaj simple profitas la lokajn favorojn. Aŭ la maldungitaj labor-



istoj ne taŭgas por la proponitaj laboroj. Kelkaj translokigis, sed la plimulto preferas resti surloke. Kien iri? Cie en Francio estas senlaboreco, prefere esti sen-labora en sia regiono kaj en la suno.

Ĉu nur turisma estonto?

Rimarkindas, ke la urbestro ne batalas por defendi la ekfunkcion de la riparejo. Ĉar venis nova urbestro, dekstrulo, kiu sekvas komunistan. Se vi nun informiĝas, kiu voĉdonis por li, vi trovos neniun! La nuna urbestro, Lafond (Lafon) estas konstruentreprenisto kaj li planas por La Ciotat betonan estonton! Oni konstruu vilaojn kun propra kajo, luksajn hotelojn, golfejojn, novajn havenojn por jaĥtoj kun la celo venigi riĉulojn. Ilin atendante, oni plantas palmarbojn (en 90, estis investitaj en palmpiantado 900 000 francajn frankojn) la lokaj impostoj altiĝis je 23 % (la laŭleĝa maksimumo). La celo estas forigi la famon de La Ciotat kiel laborurbo por ke ĝi fariĝu turismurbo.

Ambaŭ estas kunigeblaj. La golfo, ĉirkaŭata de lafaj rokoj, ĝuas aparte mildan klimaton; la pinarbaro ĉirkaŭe ankoraŭ ne brulis; funkcias markuracejo kaj fiŝbredejo ĉar la maro ne estas tro poluciita. La malnova urbo provizas turistojn per malnovaj stratoj, domoj kaj pordejoj de la 17a jarcento; la sablaj strandoj invitas al banado, kaj la multaj restoracioj, hoteloj kaj kafejoj atendas jam la turistojn. Filmfestivalo memorigas, ke en la stacidomo de La Ciotat estis fari-

ta la unua filmo fare de fratoj Lumière (Lumjér). Tie ankaŭ naskiĝis la fama pilkludo *pétanque* [petank] el *pieds tanqués* (piedoj firme apogantaj sin). Turistoj do venu, sed ili alvenu en veran urbon, kiu vivas dum la tuta jaro, ne en artefaritan porturistan kreitaĵon. Ŝipkonstruejo ne estas polucianta industrio, ĝi permesas konservi la purecon de la aero kaj de la maro sed alportas animon al mezgranda urbeto.

La estonto montros, kiu pravis, la porturista aŭ la porlabora skolo. Sed atendante tuta generacio formortas kaj abomenas „Eŭropon“.

TRIOLE Renée

TEKNIKO

Kiel ŝpari benzinon...

Pro la krizo en Irako, multaj aŭtomobilposedantoj provas ŝpari benzinon kiel eble plej zorge; espereble ĉi tiu informo kuraĝigos ilin. La 30an de aŭgusto 1990 aŭtomobileto *Moss Angliss* veturis 14km uzante nur 13,3 mililitrojn da benzino. Jes prave, por iri 1055 km ĝi bezonus nur unu litron. Tio okazis apud Sidnejo en Aŭstralio, ĉe la Amaroo-kurejo (Amaru), kiun la konkursantoj devis ĉirkaŭiri dekofoje en malpli ol 35 minutoj je 25 km/h rapideco.

Kompreneble temas pri neordinara aŭtomobilo; ĝi venkis en la 10a ĉiujara *Shell Mileage Marathon* ([Ŝel] benzinŝpara konkurso), kiu estas organizita de la granda internacia firmao *Shell*, kaj en kiu ĉiu konkursanto devas obei rigorajn regulojn. Bicikloj estas malpermesataj, tri aŭ kvar radoj devas konstante kontakti


la vojon, la distanco inter la radoj, mezurite flanke, devas esti pli ol 499 mm, kaj mezurite de la antaŭa rado ĝis la malantaŭa rado devas esti pli ol 999 mm. La radoj kutime uzitaj estas multekostaj radoj de konkursaj bicikloj, kovritaj ambaŭflanke per plastaj kovriloj.

Motoroj devas uzi senplumban benzinon provizitan de la firmao *Shell*. Dum la fruaj jaroj tuj post la komenco de la konkurso en 1980, multaj konkursantoj utiligis malgrandajn motorojn de la *Honda*-mopedoj, sed lastatempe oni preferas malgrandajn motorojn konstruitajn por modelaj aviadiloj; la piŝtodismeto estas nur 10 ml kaj ili produktas nur 0,05 kW, kontraste kun la konkursaŭtoj kiuj ofte ĉirkaŭiras la kurejon apud Sidnejo, uzante 400 kW-ajn motorojn por atingi 250 km/h.

La aŭtetoj estas eksterordinaraj aerodinamikaj; kutime la ŝoforoj kuŝas surdorse, sed kelkaj veturas vizaĝaltere; porti fortajn kaskojn estas devige. La maŝinoj pezas proksimume 30 kg, kaj oni devas elekti etajn sed inteligentajn ŝoforojn. Kelkaj teamoj preferas ŝoforinojn, ĉar ili estas malpli pezaj ol viroj, kaj ofte pli inteligentaj; kelkaj ŝoforinoj pezas nur 40 kg.

Tamen *Moss Angliss* ne sukcesis superi la rekordon de la teamo *Ford*, kiu en la 1985a konkurso bezonis nur 1 litron por iri 1815 km. Tiu estas la aŭstralia rekordo; la tutmondan rekordon gajnis japana teamo en Britio, je 2270 km per unu litro.

Ekzistas ankaŭ aparta klaso de „pendolveturiloj“ kiuj espereble taŭgas por la ĉiutaga vojaĝo de la antaŭurboj ĝis la oficejo, kaj revene. Ili devas provizi 2 seĝojn ne kuŝantajn je pli ol 45 gradoj, kaj porti antaŭan glacon kaj glacoviŝilon, kaj



La rekorda ŝpar-aŭtomobilo de Ford.

pezu malpli ol 250 kg. Dum la 14 km-konkurso, pasaĝero devas rajdi flanke de la ŝoforo. La motoro por la „pendolveturilo“ funkciu la tutan konkurson, kvankam la unuseĝaj maŝinoj rajtas atingi sufiĉe grandan rapidecon kaj poste iri kun malkluĉitaj motoroj, se nur la meza rapideco estu 25 km/h. Efektive tiu tekniko lastatempe iĝas malmoda; ĝi bone efikas kun la „granda“ Honda-motoro sed ne taŭgas al la modernaj 10ml-motoroj.

Ĉi-jare gajnis la venkon, en la duseĝa klaso, aŭtomobilo konstruita de ĝlernantoj en adelajda gimnazio *Wirreanda* [Ŭirianda]. Ĝi veturis 268 km per unu litro da benzino, kaj la ĝjunuloj ege entuziasmiĝis, lernante fizikon kaj inĝenieran desegnartron survoje. La gepatroj plendis, ke la ĝfiloj ne revenis hejmen ĝustatempe por manĝi la vespermanĝon, sed preferis resti ĉe la lernejo laborante por perfektigi la karan maŝinon.

Ĉu oni povus ŝpari eĉ pli da benzino, se oni biciklus al la laboro, kiel en Ĉinio en Hindio?

ROBERTSON Robert

EKOLOGIO

Honorigo por la patro de la natur-protektado

„Skrabis gravan leteron pri la protektado de la naturo“ Ernst Rudorff [Rudorf], berlina profesoro pri muziko, notis la 9an de novembro 1888 en sia taglibro. Tiel li estis kreanta la terminon „protektado de la naturo“, kiun li ok jarojn pli frue estis difininta en sia eseo „Pri la rilato de la moderna homo al la naturo“. Okaze de la 150a datreveno de lia naskiĝtago la poŝto en okcidenta Berlino honorigis la pioniron de la germana movado por la protektado de la naturo per speciala poŝtmarko kaj stampo.

La poŝtmarko estis kreita de la munkena profesoro Fritz Lütke [Fric Lidke] kaj bildigas la simbolan interligon de homo kaj naturo – la trape-netradon de Ernst Rudorff per sia ideo de la protektado de la naturo.

Antaŭ pli ol 100 jaroj Rudorff atentigis pri la detruo de la vivmedio pro la ordigo de la agrikultura kampo kaj pro la evoluo de la industrio. Sur la gepatra bieno li sekvis la rigidecon de la prusa registaro „transformi la buntan, ĉarman pejzaĝon al laŭeble glata, kalva, regule dispartigita skemo de mapo. Ĉiu elstaranta pinto de forsto estas razita obeante la ideon de rekta linio. Ĉiu herbejo, kiu ŝovas sin el la arbaro estas reforstumata.



Riveretoj, kiuj havas la malbonan kutimon serpentumi en tordita fluo, devas alkutimiĝi al fluo en rektaj fosoj.“ Rudorff atentigis, ke la forhakitaj heĝoj, arboj kaj arbustoj al neniu donas ripozejojn kaj al neniu birdo nestojn. Antaŭ pli ol 100 jaroj li proponis aĉeti difinitajn herbejojn kaj arbarojn por savi la naturan pejzaĝon – ideon kiun nur dum la lastaj jaroj la organizaĵoj pri protektado de naturo realigis. Sed Rudorff ne estis kontraŭ progreso ĝenerale. „Ne la novaj inventaĵoj el si mem estu kondamnitaj, sed la malsaĝeco kaj la avido de la homaro, kiu lasas sin regi de ili, anstataŭ regi ilin.“ Per la protekto de la pejzaĝo en grandaj regionoj estu „konservata la fizionomio de la patrujo kontraŭ la detruaj inundoj de la ĉiutaga vivo, kontraŭ nepripensita kaj konscia detruo“. Gravaj regionoj iĝu „sanktaĵoj de la popolo“ kaj estu „gardataj kontraŭ profanado de ilia natureco“. Tiu radikala postulo de centprocenta protekto de regionoj kaj tabuaj teritorioj ĝis hodiaŭ ne estas realigata en Germanio.

Oni sciis nenion pri li

Rudorff apartenis, kiel ekzemple la pentristo Caspar David Friedrich [Kaspar Fridriĥ] al la artistoj, kiuj kontraŭis la teknikan epokon per la natur- kaj pejzaĝ-estetikaj valoroj de la romantiko. Li naskiĝis en Berlino, kie li komencis studi teologion, filozofion kaj filologion. Poste li iris al Lejpcigo, kie li studis en la konservatorio kaj akompanis Clara Schumann [Klara Suman] en koncertoj. Post diversaj postenoj en alte estimataj konservatorioj li transprenis la klason pri piano en la nove fondita reĝa muzika altlernejo en Berlino, kie li loĝis ĝis sia morto en la jaro 1916.

Pro la agado de Rudorff en 1906 fondiĝis „Ligo por la protekto de la hejmlando“, kiu poste ŝanĝis sian nomon al „Germana ligo de la hejmlando“. Sed post kelkaj jaroj Rudorff seniluziigite forlasis ĉi tiun organizaĵon, en kiu dominis arkitektoj kaj inĝenieroj. La organizaĵo pli kaj pli bonvenigis diversspecajn industriajn konstruaĵojn: akvocentraloj estu akceptendaj, „se la konstruado okazas en bela formo“ kaj artefarita baraj-

lago „similas al norvega fjordo“. Vere kompetenta organizaĵo por la protekto de la naturo laŭ la ideo de Rudorff nur ekestis en 1950 per la fondo de la „Germana kartelo por protekto de la naturo“ (*Deutscher Naturring, DNR*).

La estimon de la protekto de la naturo en la hodiaŭa Germanio montras la fakto, ke s-ro Schwarz-Schilling [Ŝvarc-Siling], federacia ministro de la poŝto, ne pretis honorigi Rudorff per tutlanda poŝtmarko, sed nur permesis 60pfenigan poŝtmarkon en la kadro de la speciala serio por okcidenta Berlino. Tie oni komence nenion sciis pri Rudorff, konfesis Ulrich Lange [Ulriĥ], estro de la informservo de la berlina poŝto. Li petis informon de la koncerna instanco de la berlina registaro, sed tie la nomo Rudorff estis same nekonata. Sed nun ambaŭ estas dankemaj al la „laborrondo pro profesia kaj libertempa protekto de la naturo“, kiu estis proponanta la poŝtmarkon. La organizaĵo festis la 150jaran datrevenon per la „20a germana tago por la protekto de la naturo“ en aprilo en Bad Reichenhall [Rajnhall], kie ne nur estis aŭdeblaj verkoj komponitaj de Rudorff, sed ankaŭ traktataj la ekesto kaj la evoluo de la protekto de la naturo en Germanio.

SCHNELL Roland

MEDICINO

Novaj esploroj pri skizofrenio

La sanstato de la patrino dum la lastaj monatoj de la gravedeco eble influas la postan disvolvigon de skizofrenio en la ido. Esploroj ĉe la Reĝa Kolegio (*King's College*) de la Londona Universitato trovis neatendite grandan nombron de skizofreniuloj inter homoj naskiĝintaj en Britio komence de la jaro 1958, ne longe post gripepidemio dum la finaj monatoj de la jaro 1957. Ĝenerale, skizofrenio okazas pli ofte inter homoj naskiĝintaj ĉe la fino de la jaro, kies patrinoj elmetiĝis al la tuta gamo de vintraj malsanoj ne tre longe antaŭ la nasko.

Oni supozas, ke la patrino malsano kaŭzas miskonektojn en la disvolviĝanta cerbo de la feto. Jam oni trovis, ke skizofreniaj cerboj havas pli grandajn centrajn spacojn (ventrikolojn), dum aliaj strukturoj estas malpli grandaj, precipe la hipokampo¹, kiu

1. Hipokampo: parto de la cerbo, proksime de la flara centro (latine: *hippocampus major*).

tre gravas rilate la memorkapablon. Plie, evidentiĝas, ke ĉelaro, kiu devus migri dum la embria stadio el la mezo al la rando de la cerbo, ne sukcesas fari la tutan vojaĝon. La sekvoj, nome skizofrenio, evidentiĝas jarojn poste ĉe la adoleskanto aŭ plenkreskulo, sed antaŭe ofte ekestas problemoj rilate la konduton de tia infano.

La heredo tre influas skizofrenion: dum la malsano evidentiĝas en 1 % de la tuta loĝantaro, la probableco, ke ĝi ekestos en identa ĝemelo de suferanto jam estas 45 %. La sezona influo ŝajnas gravi nur tiam, kiam ne ekzistas familia historio de skizofrenio.

Aliaj esploroj povas subteni la proponitan ligan inter skizofrenio kaj problemoj dum la gravedeco. La malplioftiĝon de mortoj inter novnaskitoj ekde la 1950aj jaroj paralelas malpli grandigo de la nombro de skizofreniuloj.

UNGAR Krysz

MEDICINO

Oksigeno helpas konservi renojn

Ren-transplantado nun estas kutima kaj tre disvastigita metodo de kurado, tamen ĝis nun la operacio restas malsimpla kaj ne mankas problemoj. Unu el la plej gravaj estas konservado de donita reno ĝis momento de transplantado. En multaj landoj ekzistas sistemoj de renkonservado en specialaj solvaĵoj kaj de livero al loko de operacio en transport-konteneroj. Maksimuma templimo de konservado estas 40 horoj, tamen – kvankam jam ekzistas tutkontinentaj firmaoj (ekzemple „Eŭrotransplantat“) – kontentigi mendojn de klinikoj pri renoj iĝas ĉiam pli malfacila. Fakuloj vidas solvon de la problemo en plibonigo de templimo por konservado.

Novan konservomanieron de renoj inventis esploristoj de tutunia esplorcetro pri ĥirurgio (Moskvo), sub gvido de fama sovetia ĥirurgo Boris Petrovskij. Donitan renon oni unue tralavas, trapikas en kelkaj lokoj per tre maldika pinglo kaj poste lokas ĝin en cilindron kun fiziologia solvaĵo, antaŭe konektinte vejnon, arterion kaj urindukton al oksigenbalono. Oksigeno eniras renon kun superflua premo (30-40mm de Hg), „trablas“ ĉiujn ties histojn, ĉelojn kaj poste – tra la drenigtruo – en solvaĵon kaj eksteren. Tutan sistemon (cilindro kun reno kaj oksigenbalono) oni metas en ujon por teni temperaturon de 3 – 8°C.

En eksperimentoj kun hundoj la renoj, kiujn oni konservis tiamaniere dum 24 kaj 48 horoj, ekagis tuj post transplantado; el tiuj kiujn oni konservis dum 72 horoj, nur 40 % ekagis tuj senprobleme, aliaj post kelkaj komplikajoj. Ekde 1980, post kiam oni komencis uzi la novan metodon de konservado, jam 43 pacientoj ricevis renojn, kies maksimuma konservadtempo estis (pro neceso) 52 horoj. Rezulto de la provo estis ne tiom favora, kiel en eksperimentoj: nur 19 kazoj estis sukcesaj, en 14 oni bezonis fari aldonan (helpan) hemodializon, en 10 kazoj oni devis forigi transplantitajn renojn pro diversaj kaŭzoj.

Oni opinias ke la nova maniero de renkonservado, kontraste al nunaj metodoj preskaŭ elĉerpintaj siajn eblecojn, havas multflankajn perspektivojn por plibonigo kaj por atingo de kvalite aliaj rezultoj.

NikSt

MUZIKO

Lingvo-Studio eldonis novan serion de Esperanto-kasedoj

La Esperanto-fako de LINGVO-STUDIO produktis ĝis nun 5 esperantajn kasedojn, ĉefe kiel sonmaterialajn helpilojn al diversaj porhungaraj E-lernolibroj. Por nehungarlingvanoj ĝis nun estis proponita nur unusola kasedo. Tutan serion de jam konataj kaj novaj Esperanto-kasedoj eldonis la LINGVO-STUDIO en Budapeŝto/Hungario nun. Temas pri tri kasedoj tre diversspecaj. Iom ekster la serio do eldoniĝis tiu unusola kasedo de fama profesia hungara kantisto kaj aldona kantlibreto por ĝi kiu jam konatas (mi supozas): „Al Venko“ de kantoposedanto Jozef Dinnyés. Dinnyés laŭdire apartenas al la plej bonaj hungaraj kantistoj kaj komencis kanti ankaŭ Esperante kiam li eĉ ankoraŭ ne parolis la lingvon. Sed intertempe li ŝajne tute esperantistiĝis, kio i.a. certe plibonigis lian E-prononcon. La kantoj estas grandparte movadaj kiel ekz. „Al Venko“ aŭ „Se Falante“, kiuj tamen validas same por tutmonda socio, ankaŭ ne-esperantuja. Dinnyés libere kantas siajn proprajn kantojn, mem komponas kaj poemigas ilin, enmetante ne nur informojn sed mesaĝojn. Aliaj kantoj venas el la plumo de Raymond Schwartz, Julio Baghy, eĉ L. Zamenhof („Ho, mia kor“) k.a. La ne origine esperantlingvaj tekstojn tradukis Imre Szabó. Ĉiuj


tekstoj de l' kasedo aperis ankaŭ libroforme („Al Venko“) kun muziknotoj, aĉetebblaj ĉe UEA aŭ landaj asocioj kontraŭ 6 gld.

Per „serio de malgranda eldonkvanto“ la LINGVO-STUDIO nun volas helpi al esperantistoj akiri altkvalitajn kaj multtekostajn E-sonkasedojn, kaj samtempe havigi al ili memoraĵojn pri nur unufoje sonintaj, neforgesendaj koncertoj.

Tute alispeca kompare al tiu de Dinnyés, estas la unua kasedo el la serio: La „Mesio“ de komponisto Georg Friedrich Händel, registrita koncerto dum la Budapeŝta Printempa Festivalo. Esperantlingve prezentas profesiaj operistoj kun la ŝtata koncert-ensemblo tre altkvalitan kaj belsonan oratorion. En la kasedujo ankaŭ kunmetiĝis la bone kompreneblaj tekstoj. Certe tre ĝojiga surbendigo por ŝatantoj de ne nur klasika muziko, sed ankaŭ por elastaj modernmuzik-ŝatantoj. Havebla kontraŭ nur 18 gld. samloke ĉe UEA k.s.

Dua parto de la „Serio de malgranda eldonkvanto“ estas belega kasedo de **Jomart kaj Nataŝa**, kies koncerto dum la Internacia Junulara Semajno en Szolnok/Hungario registriĝis. Estas kantista paro el Sovetio kiu prezentas tre mildajn, lirikaĵajn, melankoliajn kantojn per kiuj ili ravegis jam multajn ĉeestintojn dum la koncertoj (cetere, ankaŭ jam ekzistas disketo kun kvar iliaj kantoj). La kasedo „Debuto en Eksterlando“ haveblas kontraŭ 15 gld. ĉe UEA k.s.

Tria kaj lasta en la serio estas kasedo de la „Korusa Festivalo“. Surbendas fragmentoj de la korus-festivalo dum la Budapeŝta Universala Kongreso, kaj kiu ĝin ĉeestis, certe povas kon-



senti ke temas pri havinda ero el nia Esperanto-kulturo (12 gld. UEA).


Do, resume ĉiuj kasedoj haveblas ĉe UEA: NL-3015 BJ Rotterdam, Nieuwe Binnenweg 176; prezon de la kasedoj pagu al UEA favore al konto ELLS-S. MAUL Betti

libroj

ĜUNDA KRIMO

Nuda virina kadavro estas trovita en sveda lago. Martin Beck kaj liaj kolegoj scias nenion pri ŝi, nek pri ties murdinto, almenaŭ komence de la libro ne. Pecon post peco tamen ili sukcesas fini la puzzleon, akompanataj de la leganto, kiu renkontos neatenditan finon.

La libron Roseanna verkis Maj Sjöwall kaj Per Wahlöö, du svedoj kiuj estas konsiderataj plej elstaraj aŭtoroj de detektivromanoj dum la ses- kaj sep-dekaj jaroj. Elsvedigis la verkon Malte Markheden. Ne dezir-



ante iĝi pedanta, mi tamen iom serioze riproĉu al la tradukinto kaj eldonejo: en ĝenerale tre flua kaj ĝinda Esperanto tro abundas evidentaj eraroj (Ĉu okazis ion? - Tio mi ne scias. - Ili estis veturinta ktp.). Krome al mi nekompreneble estas la plurfoja uzo de ten, supozeble novismo por dek. Malgraŭ tiuj misoj, kiuj feliĉe ne aperas ĉiupaĝe, mi ĝuis la libron kaj certe aĉetus duan libron de la samaj aŭtoroj, se tiu eldoniĝus. pp

Maj Sjöwall kaj Per Wahlöö: Roseanna. 202 paĝoj en formato A5; bindita. Eldonis Progreso, Motala. Prezo ĉe FEL: 592 BEF + afranko.

LINGVOJ

Alfabetoj tutmondaj

Jen prezentiĝas la korea, la araba kaj la hindia alfabetoj, la skriboj de grandaj popoloj. Ofte oni legas pri tiuj landoj, sed pri iliaj lingvoj nur malofte. Sed ĝuste en tio malfermiĝas al ni ankaŭ peco de iliaj kulturoj, kiujn ili amas, kaj kiujn esperantistoj plene estimas. Pri la korea skribo ne multe ni scias, des pli interesa estas kelkaj frazoj el la bele skribita libro *Hun Min Gong Um* verkita de s-ro Bak Giŭan kaj eldonita de Korea Lingva Societo.

S-ro Bak Giŭan instruas oficiale Esperanton kiel duan lingvon en la Dankook Universitato en Seulo kaj studas esperantologion kaj korean lingvistikon en doktoriĝa kurso. Estas ĝojige, ke li en internacia lingvo skribis pri siaj lingvistoj kaj pri siaj klopodoj vaste konigi *Hun Ming Gong Um*.

Hun Min Gong Um estas la plej malnova, la unua nomo kaj signifas „Ĝustaj Sonoj por Eduki la Popolon”. La nuna nomo de korea alfabeto estas Han Gul kaj signifas Ĝustaj Sonoj.

La korea alfabeto estis kreita kaj publikigita de reĝo Seĝong en la jaro 1443. Li estis ŝatata de la popolo kaj nomita Seĝong la granda. Nuntempaj lingvistoj miras, ke jam en tiu tempo en Koreio lingvistiko estis tre altnivela, kaj sukcese inventiĝis perfekta skribosistemo plej taŭga por korea lingvo.

Kiam ni retrorrigardas la historion de korea alfabeto, ni povas denove konstati, ke ĉiu nova geniaĵo devas renkonti malfavorajn cirkonstancojn. Ankaŭ ĝi renkontis tre malfavorajn cirkonstancojn. La 10a reĝo Jonsangun (1494-1506) malpermesis uzi la novan alfabeton kaj forbruligis ĉiujn librojn kaj reenkondukis la ĉinajn ideogramojn.

La lingvo de nia lando, diris la reĝo Seĝong, malsamas al tiu de Ĉinio, kaj oni ne povas bone interkomunikiĝi per ties ideogramoj. Tial estas multaj nekleruloj, kiuj neniel povas esprimi sian ideon, kvankam ili volas transdoni ĝin. Mi komparas ilin, kaj nove kreas 28 literojn. Mia deziro estas nur tio, ke ĉiuj homoj ilin lernu facile kaj uzu oportune en ĉiutaga vivo.

La tabelo volas esti praktika ekzemplo de facila komparebleco inter la sonoj de Esperanto kaj aliaj lingvoj. La hindia alfabeto kie unue venas la vokaloj kaj poste la konsonantoj laŭ fonetikaj reguloj instigis vicigi la alfabeton iom alia. Por pli bone distingi inter similsonaj konsonantoj, ili ricevis tie „o” aŭ „e”.

KOBELT Walter

fonet.	esper.	korea	araba	hindia
a	a	ㅏ	آ	आ
e	e	ㅓ	إ	ए
i	i	ㅣ	ـ	इ
j	je	ㅑ	ي	य
o	o	ㅗ	أ	ओ
ó	—	ㅛ	—	—
u	u	ㅜ	او	उ
ù	ùe	ㅡ	—	उ
w (y)	—	ㅟ	—	—
b	be	ㅃ	ب	व
p	po	ㅍ	پ	प
v	ve	ㅍ	و	व
f	fo	ㅍ	ف	फ
d	de	ㄷ	د	द
dy (dʒ)	ĝe	ㅈ	ج	ज
t	to	ㄷ	ت	त
ts	ce	ㅊ	ث	तस
tx (tʃ)	ĉo	ㅉ	ث	च
g	ge	ㄱ	غ	ग
k	ko	ㅋ	ك	क
h	he	ㅎ	ه	ह
q (ç)	ĥo	—	ح	ख
l	le	ㄹ	ل	ल
r	ro	ㄷ	ر	र
m	me	ㅁ	م	म
n	no	ㄴ	ن	न
z	ze	—	ز	ज़
s	so	ㅅ	س	स
y (ʒ)	ĵe	—	ژ	झ
x (ʃ)	ŝo	—	ش	श

ا	(a)	د	(d)	ن	(d)	ك	(k)
ب	(b)	ذ	(θ)	ط	(t)	ل	(l)
ت	(t)	ر	(r)	ظ	(z)	م	(m)
ث	(θ)	ز	(z)	ع	()	ن	(n)
ج	(ĝ)	س	(s)	غ	(g)	ه	(h)
ح	(h)	ش	(ŝ)	ف	(f)	و	(ù)
خ	(ĥ)	ص	(s)	ق	(k)	ي	(i)

अ a	आ a	क ka	ख kha	ग ga	घ gha	ङ nga
इ i	ई i	च ca	छ cha	ज ja	झ jha	ञ nja
उ u	ऊ u	ट ta	ठ tha	ड da	ढ dha	ण na
ऋ ri		त ta	थ tha	द da	ध dha	न na
ए e	ऐ ei	प pa	फ pha	ब ba	भ bha	म ma
ओ o	औ au	य ja	र ra	ल la	व va	
		श sha	ष sha	स sa		ह ha

Rimarkoj:

La hindaj vokaloj substrekitaj estas longaj; la konsonantoj f, ĥ, z kaj ĵ inventiĝis por fremdvortoj.

La literoj ĉ, p, q, kaj j en la araba alfabeto estas persaj sonoj.

de János Sárközi

Ĉu homa socio estas iluzio?

En hungara gazeto aperis artikolo, kiu traktas la nunan orienteŭropan situacion, la disfalon de la „fera kurteno”, la strebado al unuigita Eŭropo, eĉ unuigita mondo.

La aŭtoro nomas la socialismon, komunismon, ĝenerale la konsekvencojn de la granda rusa revolucio „malluma leciono de la historio de la 20a jarcento”. La esenco de la afero estas, ke okazis provo por transformi la homan naturon, - kies eterna bazo estas la egoismo - per dekretoj. Se tiamaniere ne sukcesas - nature ne povas sukcesi - tiam per bastonfrapoj, kiel faris Stalin tre brutale, sed faris ankaŭ Lenin eĉ farintus ankaŭ Trockij aŭ aliaj. La kerno de tiu malbono kuŝas ne en iliaj malbonegaj agadoj, sed en tiu *iluzio*, ke oni povas transformi la homan naturon.

Sed laŭ la aŭtoro estas iluzio ankaŭ tio, ke nuntempe la ekonomia evoluo estas, kiu povas savi, feliĉigi la mondon; kaj li atentigas, ke ankaŭ tio estas nur iluzio. Fine li citas la ĉeĥoslovakon prezidanton, V. Havel, ke „la vera revolucio estas tiu de la homa naturo; la elaçeto de la mondo estas atendebla el tie, el la homa koro. Kaj la moralo, aŭ la bezono de la vero devas havi avantaĝon antaŭ la politika scienco kaj ekonomio.

Sed ĉu la bazo de tiu ĉi konstato estas ne iluzio? Kaj mi devas respondi, ke jes! Tamen ni ne forgesu, ke sen tiaspecaj iluzioj dum la historio, la evoluo de la homaro estas ne imagebla. La esenco de ĉiaspeca religio estas eduki, influu la homojn, ke anstataŭ egoismaj celoj ili agadu por realigo de tutkomunumaj celoj, ĉar la pluekzisto, la evoluo estas imagebla nur per tiudirekta agado.

La ĉefaj celoj de la agadoj de biologiaj estaĵoj estas la certigo de propraj viveblecoj, la estigo de idoj kaj certigi por ili viveblecojn, kaj la ekzisto de iaspeca vanteco, fiereco. La ekzisto de tiu ĉi lasta certe estas konsekvenco de la unuaj, ĉar tiu estas spertebla eĉ inter bestoj. Luktado de maskloj por la havo de inoj, rango-vico inter kokinoj, lukto por akiri gvid-poziciojn. Jack London skribas en siaj noveloj pri tio, ke sledotirantaj hundoj emas batali ĝis la morto por akiri la unuan lokon.

Finfine ĉiuj agadoj, per kiuj la vivuloj volas atingi pli favorajn kondiĉojn por

si mem kaj por siaj idoj damaĝe de la ceteraj estas la kerno de la egoismo. Tamen dum la evoluo multaj bestospecoj instinkte konsciigis, ke la propraj interesoj de la individuo pli efike realigeblas en la kadro de agado por celoj, kiuj servas ne nur la individuon: eĉ eble momente kontraŭas al la propra intereso, sed servas ŝajne nur certajn komunumojn. Plej altgrade realigis tiun vivformon abeloj kaj formikoj, sed ankaŭ en socia vivo de

SATANO MURDIS EN HUNGARIO

Satanismo kaj rok-muziko: pri obskuraj ligoj inter la du Betti Maul raportis antaŭ nelonge en MONATO (1990/3, p. 20). En la hungara urbo Mezökövácsháza komence de oktobro nun mortigis, post rok-koncerto, kiun gazeta raporto nomas „alternativa”, Satano mem.

Sangopentrita kruco kaj la vorto SATANO, disaj homaj organoj sur la librobreto, hepato surtable, dismasakritaj korpecoj ĉie sur la planko: jen kion vidis polica esplortaĉmento iun sabatan matenon ĉe la familio O. Polica. Fakulo deklaris, ke tiom stranĉitan kadavron, kiel tiu de la 13jara Krisztina O., eĉ la fakliteraturo ne mencias. Kio okazis?

Krisztián O., 17jara gimnaziano, revenis hejmen post diskoteka rok-koncerto ĉirkaŭ noktomezo. Per subita ideo li kaptis kuirejan tranĉilegon, kaj unue mortpikis, poste dissekis sian fratinton. Disŝutinte ŝiajn organojn, li vundegis kaj medikamentis sin mem - kaj ekdormis. La krimon malkovris matene la patrino.

La posta esploro montris, ke la silentema, senamika Krisztián posedis 13punktan regularon de la sekto „Satano” kaj fotokopiojn de ĝiaj eldonaĵoj. Krome interesis lin buĉi bestojn, aŭskulti *heavy metal* kaj knabinojn kun malbona vizaĝo. El la esplor-aresto li mesaĝis al sia patrino: ne li mem faris la krimon, sed iu alia pere de li...

ERTL István

pli evoluantaj bestoj, ekz. lupoj, estas spertebla tiu konduto.

Ankaŭ la prahomoj ekkonsciis tion jam antaŭ jarmilionoj, kiam ili komencis kolektiĝi en hordoj, kaj tie elformi iaspecan labordividon. La akiro de manĝaĵoj, la defendo de la vivo certe havis prioritaton, sed ankaŭ la akiro de gvidado certe ekzistis, ja la gvidanto estis liberigita de malagrablaj taskoj, kaj ĝuis avantaĝojn en la seksa vivo. Tio certe komencis havi pli grandan signifon, kiam ili divenis ke la kontentigo de la natura seksa deziro havas rilaton kun la nasko de propraj idoj.

Poste la prahomo ekkonsciis, ke la havo de certaj propraj aĵoj - unue certe temis pri konserveblaj nutraĵoj, poste havo de plaĉaj objektoj - povas certigi avantaĝojn al la posedanto. Kaj tiam, antaŭ jarmilionoj, per tiu ekkono kaj kutimo komenciĝis ĉiu, eĉ nuntempe aktuala problemoj.

Antaŭe la natura selektado per siaj kruelaj leĝoj senĝene funkciis. Restis vivantaj, povis havi idojn la plej fortaj, plej spertaj, plej belaspektaj - laŭ la tiutempa gusto; kiuj plej bone povis solvi la ĉiutagajn taskojn en la kadro de la naturo. Sed post la apero de la privata posedo de objektoj - poste teritorioj - ĉio ŝanĝiĝis. Se iu - ne nepre plej forta, plej talenta - povis akiri iujn, kaj defendi, konservi ilin, pro ili li jam ricevis nutraĵojn, ricevis inojn por generi idojn, do pro la havo de privataj posedaĵoj li/si havis avantaĝojn kaj en la vivcerteco kaj en la memreproduktado. Ekkoninte tion, la homoj komencis strebadi, luktadi por la akiro de havaĵoj.

Sed tiu tendenco estis utila, - ofte nur ŝajne utila - al la individuo, certe estis malutila al la komunumo. Gvidantoj iĝis ne la plej konvenaj, plej spertaj, plej talentaj, sed la plej riĉaj. (Tiuj du aferoj nur malofte koincidis.) La havaĵojn posedis ĉefe ne iuj, kiuj plej sperte povis produkti ilin, sed tiuj, kiuj plej sperte povis forpreni ilin disde aliaj, jen per forto, jen per ruzo.

Jam en la pratempoj vivis pensantaj saĝuloj, kiuj ekkomprenis, ke tio estas malavantaĝa por la pluevoluo, por la pluvivo de la komunumo, tial per eltrovo de diobildoj, estigo de religioj provis direkti la homan agadon al la servo de komunaj celoj. Se oni bone pripensas, tio estas la originala, baza celo de religioj. (Bedaŭrinde, ĉiu religio kaj filozofio servis la progreson nur ĝis ĝia venko, poste spertaj fiuloj ekuzis ĝin por propraj celoj.)

Ni povas citi kelkajn instruojn de Je-

suo: „Ne kolektu al vi trezorojn sur la tero, kie tineo kaj rusto konsumos, kaj kie ŝtelistoj trafas kaj ŝtelas; sed provizu al vi trezorojn en la ĉielo, kie nek tineo nek rusto konsumos, kaj ŝtelistoj nek trafos nek ŝtelos, ĉar kie estas via trezoro, tie estas ankaŭ via koro.” ... „Tial mi diras al vi: Ne zorgu pri via vivo, kion vi manĝu, aŭ kion vi trinku; nek pri via korpo, kion vi surmetu. Ĉar ĉu la vivo ne estas pli ol nutraĵo kaj la korpo pli ol vestaĵo? Rigardu la birdojn de la ĉielo, ke ili ne semas, nek rikoltas, nek kolektas en la grenejoj, kaj via Patro ĉiela ilin nutras.” ... „Tial ne zorgu dirante kion ni manĝu! aŭ kion ni trinku! aŭ kion ni surmetu! Ĉar pri ĉio tio serĉas la nacianoj; ĉar via Patro ĉiela scias, ke vi bezonas ĉion tion. Sed celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi. Tial ne zorgu pri la morgaŭa tago, ĉar la morgaŭa tago zorgas pri si mem. Sufiĉa por la tago estas ĝia propra malbono!” ... „Ĉion ajn do kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, vi ankaŭ faru al ili; ĉar tio estas la leĝo kaj la profetoj.” (Sankta Mateo, 6,25-; 7,12-)

Ĉu tio estas ne iluzio? Ĉu tio iam estis realigita? Pro tiuj instruoj mem Jesuo estis persekutita kaj krucumita, kaj multaj aliaj el liaj sekvantoj.

Misuzata religio

En la nomo de kristanismo - kiun ofte fiuzis hipokritaj potenculoj por propraj egoismaj celoj, damaĝe al la bonintenca kredantaro - tiujn belajn ideojn ili klopodis „realigi” per bastono kaj teroro. Pensu pri la perforta kristanigo, pri inkvizicio, aŭ pri la angla filmo *Misio*. La bela ideologio eĉ nuntempe estas misuzata, kie ĝi iĝis oficiala ŝtata ideologio. Malgraŭ la fieraj, belegaj katedraloj, la pompaj ceremonioj, la esenco de la instruoj de Kristo dum 2000 jaroj ne estis ĝenerale realigita. Ĝi restis nur iluzioj.

Ĉar kion li volis diri - kiel mi komprenas - per la cititaj frazoj: Li tute ne volis instrui la homojn je senfara, mallaborema vivo. Li volis diri, ke el la riĉaĵoj de la naturo ni nur alproprigu tion, kiom estas nepre bezonata por la ĉiutaga vivo. Proprajn havaĵojn ne kolektu. „Provizu trezorojn en la ĉielo” devas signifi, ke per agado por la intereso de aliaj homoj, por la intereso de la komunumo vi povas akiri la amon, la estimon de aliaj homoj; ili estos dankaj al vi, kaj helpos vin, kiam vi bezonas helpon.

Se estus tiu ĉi certeco, tiu ĉi kredo - ke oni ne estos forlasita dum malsano, dum maljuneco, ke gefiloj estos zorgataj okaze de malfrua morto de la gepatroj - la plimulto de la homoj ne

okupiĝus pri havaĵ-kolektado, sed vivus vivon inda al homo; sin kulturante elformigante valorajn homajn proprecojn, ellernante gravajn sciojn, kapablecojn, artojn.

Socialismo, komunismo ĝuste tion celis. Tiuj volis - laŭ la teorio - garanti sekurecon, viveblecon por ĉiuj, per memvole, bone farita, bone organizita laboro de ĉiu laborkapabla homo.

Religioj, eluzante la egoisman homan naturon kaj pensmanieron promesis rekompencan pro la boneco, kvankam nur post la morto, tamen tio estis tre efika. La komunismo ne promesis personan rekompencan, ĝi apelaciis je la homa komprenemo kaj racio.

La kerno de egoismo

Ĉu tiu ĉi memvola, senrekompencan kunlaboro estas nerealigebla iluzio? Se oni rigardas nur la homan egoismon, tiam certe jes. Tamen se oni pripensas la veran kernon de la egoismo, tio povas ŝanĝi la opinion. Kio estas egoismo? Strebado de la individuo por la pluvivo, akiro de avantaĝoj je la damaĝoj de aliaj, por certigi siajn viveblecojn kaj tiujn de siaj propraj idoj. Sed nuntempe homo ne povas ekzisti sen socio. Saĝaj egoistoj - ne pro ia mistika altruismo, sed pro bone pripensita preventemo devas labori malegoisme, tiamaniere fortigante la socion, ĉar nur forta socio kapablas bone servi la personajn interesojn de la individuo.

Bedaŭrinde la plimulto de la homoj ne pensas pri tio - ĉu pro manko de konvena instruo aŭ manko de ekzemploj? - kaj agas kiel tiu stultulo, kiu sidante sur alta arbobranĉo, per segilo forigas la branĉon sub si.

Nobelpremiita hungara naturscienculo, Albert Szent-Györgyi multe okupiĝis pri tio, kaj priskribis siajn

pensojn en popular-sciencia libro „La freneza simio” (*The Crazy Ape*, Philosophical Library, New-York 1970). Laŭ li, en la luktado por la vivo la bestoj evoluigis diversajn „armilojn”. Grandajn dentojn, fortajn ungegojn, rapidajn piedojn, bonegajn okulojn, eĉ diversajn venenojn; unusole la relative malforta homo estis, kiu per la evoluigo de la cerbo, de la logika pensado povis regi super ĉiuj aliaj vivuloj.

Do, la homa cerbo evoluis tute ne por la „serĉo de la vero”, sed simple por la defendo de la vivo. Komence karakterizis la homan vivon nur mallongdistancaj celoj. Se nia praulo estis malsata, li cerbumadis, kiamaniere li povis akiri plej facile nutraĵon, kaj post la satiĝo, la afero ne plu interesis lin. En la praepoko, kiam vivis malmultaj homoj sur la tero, kaj ili havis nur malmultajn bezonojn, tio estis sufiĉe. Sed dume ĝuste pro la forta plimultiĝo de la homoj kaj la pligrandiĝo de la bezonoj kaj agadoj, la situacio forte ŝanĝiĝis. Inter la novaj cirkonstancoj, kiam estus bezonata bone organizita kunlaboro, la homa naturo tamen konservis sian praepokan egoisman karakteron; li volas prefere forpreni disde aliaj homoj kiujn ili jam akiris iamaniere, anstataŭ mem akiri ĝin el naturaj fontoj.

Tamen, el la strebado, akiri ĉion per la plej malgranda fortostreĉo rezultis la pluevoluo de la cerbo, de la homa scio, kaj ankaŭ la evoluo de la moderna tekniko. El la praepoka egoisma homa naturo sekvas ankaŭ tio, ke granda parto de la homa scio kaj laboro ĉiam estis uzata por produkti ĉiam pli efikajn, pli terurajn armilojn. Kaj la strebado al la facila akiro de naturaj riĉaĵoj rezultigis prirabadon, detruadon de la naturo, poste ĝian fortan malpurigadon. ➤




Egoismo kondukas ne al sufero de nur individuo, sed de tutaj popoloj: rufiĝinto pro ribeloj en Ruando (Afriko).

Nuntempe tiu agado jam atingis tian altan gradon, ke estas en granda danĝero la pluekzisto de la homaro, eĉ de la vivularo nur per la detruado kaj malpurigado de la naturo. La forte plimultiĝanta homaro, ĉefe pro vantaj, fierecaj motivoj ĉiam pli multe produktas kaj konsumas por la vivo ne nepre bezonatajn aĵojn, kaj ili baldaŭ iĝas rubajamasoj en la naturo. La disfalo de la tiel nomata „socialisma landar-sistemo” eĉ pli rapidigas tiun tendencon. Estas fakto, ke socialismo en la mondo nenie realiĝis - ne sufiĉas landon nomi socialisma - pro la manko de persona respondeco, fakscio, pro la ebleco de elformiĝo de senkontrola tiranismo, la ekspluatado de la homoj kaj naturo ne estis malpli granda ol en la kapitalisma parto de la mondo, eĉ! Tamen la teorio, kiel realigenda celo - per la ŝanĝo de la egoisma homa naturo estigi vere homan socion, donis perspektivon, esperon. Tutmonde realigi la trolaŭditan, „unusole feliĉigan” usonan-okcidenteŭropan vivoformon, materialan riĉecon per la libera funkciado de la homa egoismo, konkurso, entreprenemo absolute ne eblas, pro la limigiteco de la tero, kaj forta elĉerpiĝo de tie troveblaj energio kaj krudmaterialo-fontoj. Ju pli multaj landoj elektas la kapitalisman vojon, des pli rapide malgrandiĝas la materialaj fontoj. Cetere, jam evidentiĝis, ke tiu vivoformo igas la ho-

Minacas kolapso

mojn nek pli bonaj, nek pli feliĉaj. Se la supre menciita tendenco restas, la ebleco por tiaspeca vivmaniero daŭros nur kelkajn jardekojn, poste sekvos terura kolapso. Por malhelpi tion estas bezonate tre rapide transformi la homan naturon, pensmanieron, vivformon, valorsistemon. La ĉiun materialan havaĵon akirvola vivmaniero, kiun motivas ĉefe nur vanteco, kaŭzas kontentiĝon nur se ĝi povas vekii en la aliuloj. Tamen estas pli utile, pli feliĉe vivi tiel, ke oni klopodu akiri la estimon kaj amon de aliaj homoj per agoj por ĉiuj utilaj. La ekfunkciigo de valorsistemo, kiun Jesuo konceptis „Ne kolektu por si mem terajn trezorojn, sed ĉielajn trezorojn!” jam estas nepre realigenda. Iluzio? Jes, grandega iluzio, ŝajne nerealegebla iluzio. Nur tre rapida, tre persista tiudirekta edukado povas helpi. Sen tio la homa vivo baldaŭ estus nur memoro, se restus kiu memorus. La homaro kun sia mirinda kulturo kaj civilizo nesaveble malaperos por ĉiam.

kuirrecepto



Ŝafida dorsaĵo en spicherba mantelo.

La recepton sendis *Grün Presse*
Banano-torto

La recepton sendis **F. Vurpillot, Francio**

Alproksimiĝas la jarfinaj festoj. Se vi foje volas anstataŭigi la kutiman anason aŭ meleagron je Kristnasko per ŝafidaĵo, jen ni proponas al vi en la du lastaj numeroj receptojn por ŝafida dorsaĵo en spicherba mantelo kaj femuraĵo. Ŝafida viando estas riĉa je albumino, vitaminoj A, B, B₂ kaj mineraloj. 100 g da viando liveras nur 200 kaloriojn.

Ŝafida dorsaĵo en spicherba mantelo

Bezonataj estas: 1 ŝafida dorsaĵo (ripaĵo aŭ selo 1,5 kg), senostigita, ostoj dishakitaj aparte, 2 tranĉaĵoj da griza pano, po unu bukedo da petroselo, timiano kaj bazilio, 1 ovo, 2 manĝokuleroj da mustardo, salo, ĵus muelita nigra pipro, 2 cepoj, 1 ajlero, 1 laŭrofolio, 1 manĝokulero da blankaj piprosemoj, 1 branĉeto da rosmareno, 1/2 bukedo da supverdaĵo, 40 g da butergaso, 1 1/2 l da buljono, 1 peco da ŝmirfromaĝo kun spicherboj, 150 g da densa kremo.

Procedu jene: Senkrustigu la panon, kubetigu kaj kaĉigu kune kun ovo, mustardo kaj spicherboj. Rapide lavu kaj sekigu la viandon, salu, pipru

kaj ĉirkaŭu per la kaĉo. Kovru kaj metu dum kelkaj horoj en fridujon.

Rostetu la ostojn ĉiuflanke en parto de la butergaso, aldonu la erigitajn legomojn kaj spicojn, rostetu kaj surverŝu per 1 1/2 l da akvo kaj lasu sen kovrilo sur malalta flamo ĉ. 2 horojn. Filtru kaj kuiru ĝis restas 1/4 l da buljono.

Intertempe metu la viandon en kaserolon, surverŝu ĝin per la restanta varmigita butero kaj rostu en antaŭvarmigita bakujo (250° C) ĉ. 1 horon. La viando estu rozkolora interne. Elprenu, tranĉu en dikfingrolargajn tranĉaĵojn kaj aranĝu sur plado.

Densigu la buljonon per la kubetigita fromaĝo kaj la kremo. Surtabligu en saŭcujo. Kiel almanĝaĵo taŭgas verdaj fazeoloj, kradrostigitaj tomatoj kaj gratenitaj terpomoj.

Banano-torto

Bezonataj estas: por 6persona deserto, 200 g da faruno, 100 g da butero, pinĉaĵo da salo, ĉ. 100 g da akvo.

Por la kovraĵo: 3 bananoj, 100 g da sukero (se bruna nur 50 g), brandoglaseto da rumo.

Procedu jene: Per forko miksu farunon kaj buteron, aldonante iom post iom la akvon, knedu glatan paston. Rulplatigu ĝin kaj kovru fundon kaj rando de torto-muldilo (Ø 25 cm). Enpiku kelkloke per forko. Kovru per 3 mm dikaj bananotranĉaĵoj. Surŝutu ĝin egale per la sukero kaj surgutigu per la rumo. Baku je modera temperaturo (170-189° C) ĉ. 1 horon (ĝis la suko malaperis).

Surtabligu kiam ĝi estas malvarma. Taseto da kafo poste certe estas bonvena.

Konsiloj pri edukado

KIEL PLANTO

Multo funkcius pli bone, en la kampo eduka, se ni rilatus al infanoj kiel ni rilatas al plantoj.

Al planto oni neniam faras humiligan rimarkigon aŭ longan paroladon moralecan, oni ne provas ĉantaĝi al ĝi montrante sin kompatinda, oni ne lasas ĝin invadi la tutan spacon sen al tio reagi, oni ne minacas, nek plendas, ke tiel estas tro, oni ne diras (aŭ subkomprenigas): „mi vin amos (nur) se...“ Al ĝi oni ĝenerale dediĉas atentoplenan flegadon. Ofte oni dokumentas sin por scii, kiel plej bone certigi ĝian harmonian kreskon kaj disfloradon. Oni konsentas pri la fakto, ke ne utilas fari al ĝi ion ajn: ĝi ja havas sian naturon, kaj oni ne ricevos taŭgan rezulton, sen tiun respekti... Sed, kompreneble, plantoj akceptas niajn farojn sen ribele. Infano, male, estas kvazaŭ konstanta ŝprucado de disdirektaj fortoj; se ni ne intervenas, ĝi povas plej strange agi, kaj, kiam ni intervenas, ĝi reagas propramaniere, ne necese laŭ niaj deziroj. Ne estas facile konduki la home-tojn al ni konfiditajn ĝis la maturecon de ekvilibra persono, kapabla disvolvi sian vivon racie por si kaj utile por la aliaj. Krome, ni tiom deziras, ke niaj idoj feliĉu!


Estas granda distanco inter niaj deziroj kaj nia sento pri devo, unuflanke, kaj, aliflanke, la konkretaj ebloj agi. Ne estas evidente, scii, kion fari. Kaj ofte, kiam ni havas la impreson tion scii, la troa laceco kaŭzata de la vivkondiĉoj malhelpas, ke ni efektivigu la necesan faron. Rezulte, ni sentas nin terure senhelpaj, des pli, eble, ĉar ni konscias, ke de nia agmaniero grandparte dependas la posta vivo kaj feliĉo de homo: nia filo aŭ filino. Kia respondeco! Al la normala sento de senkonsileco tiel miksiĝas timo fiaski. Ofte ĝi koloriĝas per kulposento: „mi ne kapablas plenumi mian eduktaskon, mi ne faras, kion mi devus“. Ĉe iuj, tiu jam malfacila situacio iĝas eĉ pli komplika pro sennuanca psikologia vulgarigo, kiu donas la impreson, ke kion ajn vi faris, vi devis fari ion alian. Oni tiel konfuziĝas, kaj konfuziĝo, ĉe granda respondeco, facile vekas timon.

Nu, kiel scias ĉiu, kiu observis bestojn, ekzistas tri instinktaj manieroj reagi al timo: forkuri, senmoviĝi, ataki. La tri

retroveblas ĉe edukantoj. Iuj forkuras: ili okupiĝas pri io alia ol la konkreta edukproblemo kaj, prokrastante la intervenon, kiun la bono de infano postulus, ili lasas tiun fari ion ajn, kvazaŭ sufiĉus pensi, ke ĉio mem solviĝos, por ke la problemo malaperu. Aliaj estas kvazaŭ paralizitaj: ili silente suferas inferon el kulposentoj, senhelpeco, soleco; ili ja opinias, ke necesus fari ion, sed ili ne vidas kion, aŭ ne trovas en si la forton necesan por agi. Tria tipo agresas: tiuj jen elektos teruradon, tiel ke ili rilatos kun la infano ĉefe ordone, riproĉe, minace, pune aŭ per humiligaj sarkasmoj, jen simple malbonhumoros, eventuale kulpigante la kunedukanton.

Por eviti tiujn stumblilojn, necesas reveni al ilia origino: timo, kaj unue akcepti, ke ĝi estas normala, kvankam ne bon-efika. Utilas scii, ke timi estas normala reago al tasko, al kiu oni ne preparis ilin. Kion ili timas? Plej diversajn aferojn. Ekzemple, ke ili igos siajn gefilojn malfeliĉaj, aŭ ne sufiĉe bone ekipitaj, psike, por sukcesi en luktoplana vivo. Aŭ, ke la konatoj juĝos ilin malbonaj gepatroj. Aŭ ilin angorigas la infano mem. Ties reagoj ja povas esti timigaj. Kaj oni povas eĉ antaŭtimi la reagojn, kiujn ĝi elmontras poste, kiel adoleskanto aŭ juna plenkreskinto.

Kompreninte, ke timo estas normala, sed malutila, kion fari pri ĝi? Diru, ke necesus anstataŭigi ĝin per fido, ne multe helpas. Fido, same kiel timo, ne aperas laŭvole. Tiuj sentoj aperas mem en ni, ni ne decidis: „jen mi timos“, „jen mi fidus min“.



Sed, kvankam sentoj ne naskiĝas laŭ niaj deziroj, tamen oni povas ilin nutri, aŭ ilin malaperigi senigante ilin je nutraĵo.

Rilate al metodo por anstataŭigi timon per fido, religiaj kredantoj havas avantaĝon. Unu el la *psikologie* plej efikaj rimedoj tiukampe ja estas preĝi. Ekzemple ĉiuvespere alparoli Dion proksimume jene: „Sinjoro Dio, mi estas senhelpa, senkonsila, elĉerpita. Mi havas la senton, ke eduki tiujn infanojn superas miajn kapablojn kaj fortojn. Sed vi povas helpi. Inspiru al mi. Instruu al mi la arton ĝuste reagi samtempe trankvile kaj firme...“

Egale, ĉu ĝi havas spiritan valoron aŭ ne, preĝado do estas psikologie efika, se praktikata en taŭga, fidplena etoso. Sed kion fari, se vi ne kredas je spirita helpemaj estaĵoj? Vi povas fari ion similan, tamen, ĉi-kaze, direktitan al la helpemaj fortoj en *vi*. Tro longigus ĉi tiun artikolon preparoli tiujn, sed, kredis min, ili ekzistas, kaj tion eblas pruvi. Diru do al vi mem: „le, kaŝe en mi, ekzistas rimedoj, pri kiuj mi ankoraŭ nenion scias. Mi agigos ilin. Venu fido. Venu kompreno. Mia intuicio progresu, pliklariĝu. Mi alvokas ĉion plej bonan en mi helpi trovi solvojn al la edukproblemoj, helpi min seniĝi je timo...“ Vi ne ŝanĝiĝos de unu tago al alia. Necesos pacienco. Sed se vi kiel eble plej ofte ripetadas tiajn frazojn, vi iom post iom nutros en vi fidon, kaj timo pli kaj pli sentos sin nehejme en via personeco, ĝis finfine ĝi entute forlasos vin. Rilatu al vi mem, kiel vi rilatus al infano. Se infano timas, vi instinkte trovas la ĝustan sintenon. Vi diras: „Ne timu, mi staras apud vi, jen mi estas, ne estas grave“, kaj la infano repaciĝas, eĉ se vi tute ne scias, kiel elturni vin el la situacio. Traktu vin same, kaj timo iom post iom forsvenos.

Nutrata ĉiutage, fido pli kaj pli instaliĝas en la personeco. Dume, ne plu barate de timo, krea imago stimuliĝas. Solvoj aperas, kiujn trovi oni kredis sin nekapabla. Oni komencas disradii tiun etoson de humila forto, trankvila, kvieti, kiun la infanoj bezonas por disflori. Oni ĉesas dramigi la okazaĵojn, aŭ ilin minimumigi. Kaj same kiel planto, ricevanta la ĝustan kvanton de akvo, lumo, varmo kaj nutraĵoj, protektata kontraŭ dornabetoj kaj aliaj invadaĵoj, unuvorte, traktata senpanike, respekte al ĝia naturo, la infana psiko harmonie disvolviĝas. Iutage, ĝi fruktos.

PIRON Claude

(Fino)

V. Verda

Blanka oro

Hodiaŭ venos al la kliniko la Nobelino. Jam ŝi vizitis por konsultado kaj instrukcioj, kaj ŝi estas kontenta, ke D-ro Onanz povos solvi ŝian problemon. Ŝi koncipos per lia speciala metodo de transmeto de spermato donita de iu zorge elektita donacinto, kaj ĉion oni faros hodiaŭ. La edzo de la Nobelino ne povas provizi. Li estas tre tre riĉa, kaj el la sama afrika raso, kaj forte deziras, ke ŝi nasku por li infanojn. Sed li ne kapablas sian flankon de la procedo. Li pagos alte.

La Nobelino alvenas kaj D-ro Onanz ŝin bonvenigas humile. Por 25 000 dolaroj li humiligus sin antaŭ iu ajn. Li kliniĝas antaŭ la Nobelino. Li kondukas ŝin en la privatan parton de la kliniko. Tie li denove klarigas la procedon: iomete da anesteziado, mallonga dormeto, dume li enmetos tubetojn kun la zorge preparita kaj superzorge elektita spermato de la plej altranga brunhaŭta, samrasa, fortika kaj belaspekta (tamen nekonnata) viro el ŝia lando. Li, D-ro Onanz, demetos la blankan spermato en la korpon de la Nobelino kaj ŝi kovos... Fidu al li. Lasu al li. La provizinto de la spermato ja estas la plej supera en la lando.

La Nobelino konsentas daŭrigi la aferon, kaj petas renkonti la aliajn laborantojn. D-ro Onanz prezentas sian koleginon D-rinon Marta; lia egalulo prizorgos la anesteziadon kaj atenton al la stato de la Nobelino tra ĉio. D-ro Onanz prezentas Vaskon, alta brunulo, lia ĉefa helpanto dum la operacio, tre sperta homo. (La d-ro tamen ne konfesas ke Vasko estas simpla aktoro, kiu scias nenion pri medicino, kaj estas dungata nur pro sia haŭtkoloro por doni fidemon al la Nobelino.)

D-ro Onanz prezentas la kvaran personon en la operaciejo, lian specialan helpanton, junan flegistinon kiu devos stari ĉe lia flanko por doni al li la diversajn aĵojn, por zorgi ke ĉio iras laŭorde. Valora asistanto. (Li ne konfesas, ke tiu juna behulino estas nur artista studento kiu estas pli ornama ol utila, kaj estas tie nur por plaĉi al Vasko — kaj la D-ro!) La Nobelino ŝajne estas kontenta kaj iras por pretigi sin. Ŝi banas sin, surmetas vastan blankan robon, kaj kuŝas sur la operacian tablon. Marta

enmetas la pikilon de la anesteziilo — la Nobelino ekdormas.

Jam la ujo kiu entenas la donacitan spermato estas apud la tablo, kie ĝi alvenis frosta sed nun varmiĝis ĝis ĝusta homa temperaturo. Lerte la d-ro kunmetas sian aparaton, enbrudas pumpileton en tubaron, kaj turnas sin al la dormanta figuro. Li formovas la vastan robon, apartigas larĝe la dikajn kruojn kaj videbligas la „valon“ en kiu li operacios. Ĉies nazo tuj sulkiĝas je la vido. Oni tenas spiron. Rapide d-ro Onanz eklaboras. Li faris la taskojn multfoje antaŭe — kutime je kosto de nur du mil dolarojn. Por 25 mil li devas zorgi pli.

Li rapidas por fini la taskon tuj. Liaj fingroj tremetas en siaj plastaj gantoj. Li malfermas la spermatojn kaj delikate portas ĝin al la pumpileto. La malsekaj sterilaj gantoj tenas la ujon nefirme. Li ŝanceliĝas. Ĝi falas! La spermato falas! Ĝi disrompiĝas kaj la enhavo ŝpruciĝas ĉien. Sur la brunajn kruojn, sur liajn manojn, sur la plankon kaj lian ŝuon. Konserteno. Katastrofo. La blanka oro malrapide dissterniĝas ĉiudirekten. Ili ĝemas, la d-ro ululas pro mal-espero. Kion nun fari? Li kaŝas la vizaĝon sur la kruo kaj ĝemadas. La aliaj silentas ĉirkaŭ li.

Ne eblos nun tuj trovi alian zorge elektitan donacanton. La spermobanko ne estas proksima. Perdita estas la 25 000 dolaroj — kaj lia reputacio. Emocio skuogis lian korpon. Sed tuŝeto sur la ŝultro... li levas la maskitan vizaĝon kaj rigardas al la okuloj de la maskita Marta. Ŝi rigardas al li atente. Ŝi lin atentigas pri io. Li rigardas al ŝi kaj ŝi turnas la oku-

Li rigardas al ŝi kaj ŝi turnas la okulojn al Vasko. D-ro Onanz sekvas ŝian vidon. Jes, Vasko! Jen la solvo. Vasko estas ankaŭ brunhaŭta. Vasko — donu...

Vasko rigardas konsternite. Ne, ne, li ne volas. Li ne povas. Jes, Vasko vi povos. Ne, ne tutege ne. Jes Vasko — ni donu al vi mil dolarojn. Vasko hezitas, kaj subita ekvidas la faŭkon kie okazus la operacio. Ne, ne. „Mi ne povas.“ li diras. „Provu, Vasko.“ Li tuŝas la pantalonon. — „Mi ne povas.“ li insistas. „Tro mola... Mi... ne... povas nun.“

Ĉe sia flanko Vasko sentas moveton. Anjo, la artista studentino rigardas al li, tuŝas lin. Ŝiaj okuloj kokete rigardas en liajn. Ili flagretas brile. Vasko sentas la varman premon de ŝiaj mamoj tra la kitelo. Li sentas ŝiajn delikatajn fingrojn sur la nuko. Anjo nazumas lian oreilon, leketas la kolon, la molaj fingretoj karesas lian korpon. Vasko enspiras profunde. La lipetoj de Anjo pasas liajn kaj ŝiaj fingroj vagas malrapide malsupren sur la korpo. Ili tuŝas la fronton de lia pantalonon...

D-ro Onanz kaj Marta forturnas la kapojn kaj nur apenaŭ aŭdas la flustran murmureton „Ĉu vi ankoraŭ ne povas, Vasko? Mi helpos...“

☆☆☆

Post du tri minutoj la operacio rekomenciĝas. La pumpileto estas nun plena de blanka oro, freŝa, je ĝusta homa temperaturo.

D-ro Onanz estas kontenta.

Marta estas ridete kontenta.

Anjo kaj Vasko estas ege kontentaj.



Infanaj eldiroj

Mia edzino kaj mi havas tri infanojn: sinsekve venis du filinoj kaj post paŭzo de ok jaroj filo. Dum ili kreskis mi notis en kajero iliajn etulajn eldirojn por preventi ke tiuj forgesiĝu. Ĉe la 18a naskiĝtago ĉiu Nederlanda infano ricevas de Paĉjo Ŝtato la leĝan staton de plenkreskulo kaj miaj infanoj krom tio ricevis de sia vera paĉjo belkovrilan libreton kun siaj etulaj aforismoj.

Verŝajne ĉiu infanamanto ŝatas tiajn diraĵojn, kiuj montras la vivkoncepton de juna infano. Naivaj kaj ĉarmaj filozofiaĵoj! Ke tiuj de miaj infanoj montras la senzorgecon de senpremaj vivkondiĉoj estas pure hazardo. Notante mi konsciis nur iom post iom kiel interesaj la eroj fakte estas. Pro tio ili plimultiĝis de infano al infano.

Frida, du kaj duonjara, revenas de najbarino kiu atendas bebon, kaj imitas ŝian iradon, ventro-antaŭen. Mia edzino: „Frida ja ne havas bebon en la ventro kiel via najbarino, ĉu?” Frida: „Ne, mi havas terpomojn kaj saŭcon en la ventro.” Mia edzino: „Jenka (la pli juna fratino) sidis en mia ventro kaj pli frue ankaŭ Frida.” Sed Frida havas sian propran preferon: „Ne, Frida sidis en la ventro de Paĉjo.”

Post unu tago, kiam mia edzino surmetis al Frida puran ĉemizon, tiu perfingre tamburas sian ventron. Mia edzino demandas: „Kio estas en tiu dika ventro, Frida?” Respondis ŝi, montrante sian umbilikon: „Olibolo (la hundo) kiam ĝi estis ankoraŭ malgranda.”

Okaze de la unua de aprilo oni rajtas en Nederlando mistifiki unu la alian. Eĉ la plej gravaj gazetoj tiam presas artikolon por trompeti sian legantaron, ekzemple anoncanta ke okazos unika evento de la alveno de populara famulo per balono en difinita loko, aŭ anoncanta demonstracion de iu komplika inventaĵo en publika loko, ktp. — simple por vane logi la scivolan popolamason al iu loko kie okazas nenio, krom konstato de ĝia trompiĝo. Estas ja la unua de aprilo! Ankaŭ en familioj oni faras sian eblon, trompeti siajn samhejmanojn. Povas esti gaja tago. Kiam Frida estis proksimume kvarjara ŝi ankaŭ faras sian aprilan trompeton. Ŝi gaje iras renkonte al mi, kriante: „Paĉjo, ĉiuj viaj haroj estas for de via kapo!” Mi komprene kunludas, ambaŭmane prenante mian kapon... kaj Frida krias venke: „Aprilo unu, ha, ha, ha!”

Kiam Frida estis sesjara, ŝi de tempo al tempo ludas kun samaĝa bubo el ortodokse kristana familio. Iun tagon ŝi

venas hejme kaj malkovras al ni, eksterkleziuloj: „Nun mi komprenas: se sur la preĝeja turpinto estas kruco, ili parolas pri Jesuo. Sed se sur la turpinto estas virkoko (kiel ventmontrilo) ili parolas pri la koko.”

La duan de februaro 1953 la granda katastrofa inundo de la sud-okcidenta parto de Nederlando okazis, dum kiu dronis pli ol 1 800 homoj kaj same multaj brutbestoj. Ni ĉiuj estas ege konsternitaj pro la radioinformoj. Frida preskaŭ sepjara, el sia plejprofunda animo reagis indigne: „Oni diras ke ekzistas ĉiopova Disinjoro en la ĉielo, sed se tio estas vera, li estas fiulo!” Iam jena konversacio disvolviĝas kiam araneo iras sur la muro de la ĉambro. Frida: „Ĉu ĝi rajtas marŝi sur nia nova murpapero?” Mi: „O jes, se ĝi unue bone viŝis siajn ok piedojn.” Frida: „Ĉu ekzistas bestoj kun pli da piedoj?” Mi: „Jes, milpieduloj; tiuj havas kvardek piedojn.” Frida: „Kaj kiu besto venas post tiu?” Mi: „Milionpiedulo. Tiu havas okdek piedojn.” Jen Frida konklude instruas: „Kaj post tiu venas miliardpiedulo.”

Iun tagon mia edzino kaj mi mire demandis al ni, ĉu nia parenfino Lisbeta ankoraŭ ne estas akuŝinta. Tiam Frida (okjara) ekdiras: „Kaj la bebo jam longe ĉeestas!” Je nia demando „Kial vi ne sciigis tion al ni?” Frida respondas: „Mi trovis ke ŝi jam havas sufiĉe multajn infanojn. Nun ja la vico estas al ni.” Sed Lisbeta jam multe cerbumis pri nia mankanta gratulo! Unu tagon vizitis nin tre ŝatata amikino, nomata Paŭla. Dum la vespermanĝo Frida (naŭjara) demandas kial onjo Paŭla ne havas edzon. Ŝi daŭrigante faras al mi la proponon: „Ĉu vi ne povas edziĝi al onjo Paŭla?” Respondas mi: „Kaj kien tiam iru panjo?” „Nu,” Frida diras solvopreta, „panjo ja povos reiri al sia patrino en Hago kaj denove labori en la lernejo kun la surdaj infanoj!”

Unu tagon niaj infanoj iras piede al la vilaĝo por fari aĉetojn. Dum la returnpromeno Frida ordone direktas Jenkan rekte laŭ la aleo Osting kaj mem iras laŭ la pli trafikata ĉefvojo, klarigante: „Vi ne rajtas iri la danĝeran ĉefvojon, vi devas iri la rektan vojon.” Jenka atingas la hejmon plorante kaj priplendas sian fratinton. Mia edzino poste ekzamenas la kaŭzon de la ĉagreno kaj Frida malkaŝe klarigas: „O simple, kiam Jenka ĉeestas, mi ja ne povas manĝi la dolĉaĵojn.”

La patro de samklasano Lina estas nomumita universitata profesoro kaj okazis inaŭgura festo. Lina havis

bonegan vintran lernraporton kun nur naŭoj (maksimuma cifero dek). Frida estas senluziigita, ĉar ŝi havas eĉ ne unu naŭon, tamen kelkajn dekojn. „Mi kredas,” ŝi diras preskaŭ plorante, „ke la mastro plifavoras Linan.” Mia edzino klopodas konsoli ŝin. Sed Frida post paŭzo elŝutas el sia koro: „Ni ja devenas de tiom stulta parenkaro!”

K.V. Makido

Domaĝe!

Hieraŭ, dum mia meztaga liberhorso, mi iris en parkon kie mi trovis benkon en ombro. Tie mi sidis kaj kontemplis la naturon kaj flegis kelkajn personajn pensojn. Iun momenton alvenis sciuro kun belega diafana vosto kiu min distris per sia amuza konduto. Ĉe la alia flanko de la parko estis aro de ĉirkaŭ kvindek infanoj, eble 8-12jaraĝaj. Kun ili estis 3-4 plenkreskuloj, verŝajne responsaj por la tuta infanaro.

Subite knabo, eble 8-9jara, komencis kuri sole. Post kuro en larĝa kurbo, li celis al mi kurante rekte midirekten. Li metis sin malantaŭ mi dirante: „Nun ili venos por kapti min.” Mi tuj komprenis ke estis ludo kaj respondis: „Mi ne vidas eĉ unu persekutanton.” Ĝuste tiam viro, unu el tiuj responsaj, vokis lin. Tiumomente mi diris, „Estas ja via ‚mastro‘ kiu kaptos vin.”

Kiam la knabo alvenis apud la viro, mi aŭdis tiun ĉi diri al li: „Aŭskultu, mi volas klarigi ion al vi.” Mi plu ne povis kompreni ĉar la viro parolis duonvoĉe al la knabo. Mi tamen kredas scii precize pri kio temis.

Laŭ mi, la viro atentigis la knabon kontraŭ fremdaj homoj; ke oni neniam povas scii la intencojn de fremduloj, eĉ ne kiam ili ŝajnas ĝentilegaj, ktp. Ege justas ke la geknaboj estu atentigitaj tiamaniere, ĉar niaj societoj enhavas iom da malbonintencaj homoj. Mi nur iom tristiĝis, ĉar al mi plaĉis tiu spontana gesto kaj, kun mi mem, tiu knabo estis sekura kiel kun siaj gepatroj, eĉ pli ol kun iaj. Tamen mi komprenas ke nek li nek lia responsa homo povis tion scii.

Ege domaĝas ke la homaj lupoj inter ni ruiniĝas tian spontanon en niaj infanoj, kiuj estas devigitaj ‚vakciniĝi‘ kontraŭ societaj malsanoj.

EPP Victor

Kiel helpi al la Esperanto-movado en triamondaj landoj?

Per la
ABONHELPA FONDUSO
de MONATO!

Ludi gitaron sen notoj

Melodio de kozakoj rajdantaj

▽ ▽ ▽ ▽
 E₀ 0 0 2 3 3 3 A₀ 2 2 2 0 E₃ 2 0—
 E₀ 0 0 2 3 3 3 A₀ 2 2 2 0 E₃ 2 0—
 A₂ 2 2 0 E₃ 3 3 2 0 0 0 2 3 A₀ 2—
 A₂ 2 2 0 E₃ 3 3 2 0 0 0 2 3 2 0—
 Uzu prefere L kaj R!

La konvena akordo:

@-minora

Alia skribmaniero montras la kordojn kaj indikas la premendajn fretojn:

Ĉu satiro, enigmo aŭ galimatio?

Ŝtata burokratismiga institucio

Al la civitanoj

Celante, pere de ekstremgrada utiligado de la specialaj lingvaj esprimrimedoj praktikataj en la socia administracio, ĉe la unuopaj ricevantoj de ne nur tiu ĉi, sed ankaŭ de aliaj skribaj informoj kaj decidoj, de kaj ŝtataj kaj de pli lokaj aŭtoritatoj kaj institucioj, profundigi kaj firmigi la senton de konfuzo kaj senpovo, kiujn oni premisas ke ĉiu devokonscia oficisto en sia laboro klopodu engravuri en la regatojn, estas tiu cirkulero aperigita, kaj pere de prizorgo de la poŝto, post donitaj necesaj permesoj de en la afero tuŝitaj kontrolaparatoj, sendita al ĉiuj laŭ la popolregistro loĝantaj en la lando, por kiuj ne ekzistas malhelpo ke pri ĝi, en tempo kaj maniero indikitaj en la klarigreguloj al dekreto 1990 02 29 pri komunikado inter regantoj kaj regatoj, al la en la kapo de la cirkulero indikita institucio, malgraŭ ke la skribaĵo ne estas konsiderata kiel tia aŭtoritata akto kiu estas celata en § 4 en la menciita dekreto, prezenti opini-esprimon.

Por faciligi al la leganto trovi ian enhavon inter la vortoj kaj prijuĝi ĉu estas satiro aŭ nura galimatio, mi substrekis la frazerojn kiuj formas la skeleton.
PERSSON Lennart

KIA PORCIO

Kia estas la taga porcio de l' sovetia soldato, kia estas la konsisto de la nutraĵo, ĝia kalorieco? Jen kio eniras en soldatan stomakon (en gramoj): pano 850 (inkluzive de sekala pano 450); sukero 70; viando 175; butero 30; diversaj grioj 125; makaroniaĵoj 40; fiŝo 100; animalaj grasoj 30; teo 1; terpomoj kaj legomoj 850 (inkluzive terpomo 550, brasiko 120, beto 30, karoto 40, cepo 40, legomaro 40, tomatoj 40); kompoto 20. Krome en dimanĉoj kaj en festoj du ovo.

La ĉiutaga porcio de maristo estas pli diversa: ekzemple lakto 30 gramoj kaj kafo aŭ kakao 2 g. ktp.

La tuta kalorieco de soldat-porcio estas 4 145, kaj tiu de maristo 4 154 kalorioj.

Tiaj estas la oficialaj informoj. Tamen mi memoras anekdoton: Vizitanto de



Peco de tapeto

zooparko vidas sur la muro de elefanta kaĝo grandegan liston, kie oni indikas tre abundan kaj diversan porcion. La vizitanto miras: ĉu ĝi vere konsumadas tiom multe da nutraĵoj? La oficisto-servisto respondas: „Jes, certe ĝi povas tiom multe formanĝi, tamen kiu al ĝi donos?”

Ĝuste same estas pri soldatoj: en la plej multaj okazoj preskaŭ ĉiu, kiu militservis, memoras nur pri kaĉoj kaj pri kompoto en dimanĉoj kaj pri manko de iuj legomoj, eĉ dum somero. Temas ne nur pri kalorioj – ja la unuspecaj manĝaĵoj faras malbonan efikon al la sano: post la arma servo multaj suferas pro stomak-malsano. NikSt

KIA AKCENTO!

Fulano Untia naskiĝis en Ĉilio de germanaj gepatroj. Post la gimnazio li elmigris en Usonon por studi medicinon. Ĝis nun la bravulo kapablis paroli la germanan kiel denaskan lingvon, la hispanan kiel lingvon de sia medio, kaj la anglan kiel instrulingvon de la universitato. Ĉar nova doktoro devas servi kiel internulo dum kelkaj jaroj antaŭ rajti sendepende praktiki la profesion, li elektis tion fari en Japanio, pli precize en Fukuoka. Tie kompreneble li devis lerni la japanan lingvon, kion li ankaŭ faris.

Dudekelk jarojn poste estis mondskala medicina kongreso en Tokio. D-ro Untia tie prelegis. Aliaj doktoroj kaj profesoroj prelegis en siaj denaskaj

lingvoj, sed d-ro Untia prelegis en la japana.

Tio tre surprizis multajn kolegojn, inter ili sviso kiu kreskis dulingve, france kaj germane, kaj poste laboradis en anglalingva medio. Li do estas homo kiu komprenas ion pri la malfacilaĵoj de tia atingo. La sviso, aŭdinte la fluecon de la prelego sen ion ajn kompreni, scivolemis kiu akcenton havus la brava preleginto.

Poste, en konversacio kun japanaj kolegoj, li demandis pri tio: „Mi scias ke d-ro Untia bone scias la germanan, hispanan kaj anglan lingvojn. Do, parolante la japanan, ĉu li havas akcenton?” Japana kolego tuj respondis: „Ho jes, li havas fukuokan akcenton!”

EPP

Ŝercoj

„Min aŭskultu, doktoro! Mi havas ege mallongan memoron.”


„Kiom longe vi jam havas tiun problemon, sinjoro?”

„Kiun problemon?”



Junulino demandis al kuracisto pri la plej fidinda kontraŭkoncipa rimedo. La kuracisto klarigis ke vere ekzistas nur unu senriska rimedo. Tio estas trinki glasplendon da malvarma akvo. „Ĉu antaŭ aŭ post?” ŝi demandis. „Ne, ne,” li emfazis, „anstataŭ!”

EPP



Du hundoj

Krucenigmo kun kaŝfrazo (fablo de I. Krasicki)


„Kial vi dormas en ĉambro, dum mi ekstere frostas?” diras la mops', grasa hundo aĉa.

„Kial? Jen mi respondas al vi: Vi al homoj servas,... (daŭrigo kaŝita en la krucenigmo).

Horizontale: A. suferas kolapson - publika elokventa parolanto. B. estas aŭdebla - agoj - rilata al ternuksoj. C. inklinos - orbitanta akompanant', ĉirkaŭirant' - profeta eldir'. Ĉ. konjunkcio - bindita mapar' - aŭdorgan' - frakciaro. D. astato (mll.) - verkad', farad' de io, kio ne estis - komencis emi - membroj. E. *la kaŝfrazo* F. ripoza aŭ ornama ĝarden' - malgranda oazo - malfacile paŝas pro kripleco de piedo - interjekcio (abomeno). G. ŝirmtuboj, ŝirmobjektoj - rilata al hindua doktrino - rilataj al naza elfluaĵo - prefikso. Ĝ. fariĝas posedanto - virnomoj - ujo el teksaĵo por ŝutmaterialoj. H. urbet' en Israelo - neos - malmolaj (neol.). Ĥ. poemoj el 14 versoj - apudloĝantoj.

Vertikale: 1. malhumida - muzika instrument' kun klavaro. 2. duondelira peza dorm' - ne estas disponebla. 3. frakcioj - loĝanto de Kirgizujo. 4. restig' post si - riza brand' - alĝeria havenurb'. 5. sufikso de prezenco - memlumanta astro - dum jaro. 6. internacia mallongigo por deziri Feliĉan Novjaron (Por Feliĉo!) - rilataj al Alaho - Somera Esperanto-Tendaro. 7. sufiĉe manĝinta - difinitaj kvantoj, porcioj - nomo de la litero T. 8. helena di' de milito - forta emo - karesa insekso sufikso. 9. muzikaĵo, kiun prezentas unu artisto - miksaĵ' de tero kun akvo - longorela neparhuful'. 10. bedaŭra interjekcio - paŝejo - scienca prefikso (milion-). 11. kemia simbolo de radiumo - sanktej', preĝej' - „flugantaj teleroj' (angla mallongigo kun E-a plurala sufikso). 12. grupo - specio de siringo - kemia simbolo de antimono. 13. pezo de pakokovraĵo - identaj - prepozicio. 14. tiun post la sepa - malbonkvalitaj - prepozicio. 15. grimace ridas - grandega amaso de sala akvo. 16. eligos flareblajn materiojn - specialaj, profesiaj. 17. partoj de nazo - instrumentoj.

Helpiloj: 2. komat; 4. Oran; 12. lilako. MARĈEK Stano




MENSA-enigmo 15

Stranga ludo: vi devas kolekti poentojn irante de A al B, sed vi rajtas iri nur ortangule trans liniojn, do ne trans angulojn. Kiu estas la plej malalta sumo, kiu la plej alta sumo de poentoj, kiujn vi povas kolekti tiel?


La solvon de la krucvortenigmo vi trovos sur paĝo 27, sube.

Fortika plasta kolektilo por la jar-
kolekto de MONATO



Unu el la multaj bonaj ideoj de Monato

Mendu ĉe: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Poŝtĉekkonto 000-0265338-43 Prezo 320 BEF (inkl. sendkostojn)



“Stafeto”-serio prezentas:

Oktavia

Teatraĵo

Atribuita al Seneko

Tradukita de Gerrit Berveling

Nerono – imperiestro de Romo, historie sufiĉe konata pro krueleco kaj frenezeco – ankaŭ en sia familia rondo kaŭzis tragediojn. Tion montras tiu ĉi teatraĵo en kiu repudiita edzino kontraŭas konkubinon. Seneko, fama aŭtoro de filozofiaj ĉefverkoj, ankaŭ pruvis sian sperton en diversaj dramecaj teatraĵoj el kiuj “Oktavia” certe estas la plej interesa.

Oktavia 60 p., 180 BEC + sendokostoj, vinkita. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

anoncetoj

Multaj rumanoj ŝatus posedi la franc-lingvan Esperanto-gramatikon *Grammaire ABC d'espéranto*, sed ili ne sukcesas pagi. Kiu pretas donaci ekzempleron? Se vi donacas unu ekzempleron, la eldonejo mem donacas duan al alia rumano. Ĝiru 981 BEF al belga ĝirkonto 000-0265338-43 de FEL, aŭ sendu eŭroĉekon pri la sama sumo, aŭ sciigu la numeron kaj validodaton de via kreditkarto.



Internacie kuiru

Maria Becker-Meisberger

kun antaŭparolo de Marjorie Boulton

Ĉu vi ŝatus hipoglosan laŭ muelistina maniero kun leontodo-salato aŭ prefere unue Ukrainan barĉon kun pampuŝkoj kaj kiel ĉefpladon „Amo kamuflita”? Tiujn ĉi kaj ducenton da aliaj internaciaj receptoj vi trovos en la nova kuirlibro por frandemuloj:

Internacie kuiru 192 p., bindita, Prezo: 561 BEC + afranko. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Brazila Esperanto-Ligo ege dankas al ĉiuj kiuj reagis al la anonco publikigita en MONATO 1990/7. La rezultoj de la Esperanto-partopreno en la 11a Internacia Bienalo de la Libro estis tre pozitivaj.

Prezo por anoncetoj (nur teksto sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 40 belgaj frankoj* (BEF) por ĉiu linio (minimume 240 BEF*). Sama anonceto kvinfoje: triobla tarifo. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
* Por Belgio + 19% AVI.

Ĉu vi jam konas tiujn librojn?

Rikardo Ŝulco: **La sesa regulo**, kajeroj 1 kaj 2, 100 p., sume 16 DM, (funda kaj detala traktajo de la verbosistemo en Esperanto).

Rikardo Ŝulco: **Pirono Klaŭdo kaj la malbona lingvo**, 28 p., 5 DM, (sobra kritiko al la libro „La bona lingvo” de Claude Piron).

Johano Volfango Fongojto: **La fabelo**, 32 p., 5 DM, (J.W. v. Goethe: *Das Märchen*; modele tradukita de Alfredo Refeldo)

Ĉiuj libroj lingve kontrolitaj laŭ la principoj de la Analiza Skolo)
Mendu ĉe UEA, ĉe via libroservo aŭ rekte ĉe la eldonejo.

Esperanto-Centro, Paderborno
D-4790 Paderborno, Poŝtfolio 1450

SCIENCA REVUO

aperas!

Por ISAE-membroj senkosta. Interesatoj mendu la novan SR (vol. 41 (1990)-157) per pago de 20,- svisaj frankoj jarkotizo al nia svislanda poŝtĉeka konto “Pro ISAE” 80-5909-0.

Se vi volas pagi per nia konto “isae-z” ĉe UEA, bonvolu samtempe informi per poŝtkarto la administranton de la revuo:

R. Hauger,
CH 8172 Niederglatt/Zürich,
Ringstrasse 13.

**INTERNACIA
SCIENCA ASOCIO
ESPERANTISTA**

DIA REGNO

KRISTANA ESPERANTO-GAZETO

12 n-roj jare : abono 21 NLG ĉe Leen Hordijk, v. Hogendorplann 4,
NL-3135 CD Vlaardingen

Evangeliaj kajeroj

internacia kristana revuo en Esperanto

2 n-roj jare : abono 70 FRF ĉe Philippe Cousson, 26 r. de Pré-Ventenet,
F-86340 Nouaillé-Maupertuis

GRAMMAIRE ABC D'ESPERANTO

moderna franclingva Esperanto-gramatikoj en kiu lernantoj (kaj lernintoj!) povas facile trovi respondon pri ajna problemo. La gramatikoj verkas du Belgaj filologoj-instruistoj,

Emile van Damme
kaj

Christiane de Vleminck.

La libro, konsistanta el 320 paĝoj en A5-formato, koston 930 belgajn frankojn (en Belgio 986 inkluzive AVI).

Interesuloj povas peti senpage kelkajn specimenajn paĝojn, plus la juĝon de Gaston Waringhien kiu verkis antaŭparolon por la gramatiko.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk-lei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



“Stafeto”-serio prezentas:

1887
kaj la sekvo

Gaston Waringhien

Dudek kvin artikoloj kaj prelegoj de Gaston Waringhien kiuj rilatas al la historio de nia lingvo, al la lingvo kaj stilo de Zamenhof, al la farado de vortaroj, al neologismoj ktp.

Reviziita kaj ampleksigita versio de Eseo IV. 320 paĝoj, formato DIN A5; bindita; ISBN: 90-71205-33-9; Serio Stafeto n-ro 11. Prezo: 630 BEF. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk-lei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Mi jam posedas mian agendon

LA JARO

1991

LA JARO 1991

ĉar mi sufiĉe frue mendis ĝin!
Se vi ne jam havas,

mendu tuj ...

ĉe FEL, ĉe ELNA aŭ ĉe via kutima peranto!